

UTILITÉ ET POSSIBILITÉ
DE L'ADOPTION D'UNE
LANGUE INTERNATIONALE
AUXILIAIRE
EN MÉDECINE

PAR

Le Docteur Pierre CORRET

ANCIEN EXTERNE DES HÔPITAUX DE PARIS
MÉDAILLE DE BRONZE DE L'ASSISTANCE PUBLIQUE
Secrétaire de la Rédaction de *Lingvo Internacia*

PARIS

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, 33

—
1908

THÈSE

POUR

LE DOCTORAT EN MÉDECINE

FACULTÉ DE MÉDECINE DE PARIS

Année 1908

THÈSE

N°

POUR

LE DOCTORAT EN MÉDECINE

Présentée et soutenue le Jeudi 26 Novembre 1908, à 1 heure

PAR

Pierre CORRET

Ancien Externe des Hôpitaux de Paris

Né à Paris, le 11 Mars 1881.

UTILITÉ ET POSSIBILITÉ

DE L'ADOPTION D'UNE

LANGUE INTERNATIONALE

AUXILIAIRE

EN MÉDECINE

Président : M. BOUCHARD, professeur
Juges { MM. DIEULAFOY, professeur
{ CHANTEMESSE, professeur
{ BALTHAZARD, agrégé

PARIS

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, 33

1908

FACULTÉ DE MÉDECINE DE PARIS

Doyen	M. LANDOUZY
Professeurs	MM.
Anatomie.....	NICOLAS
Physiologie	CH. RICHEL
Physique médicale.....	GARIEL
Chimie organique et Chimie générale.....	GAUTIER
Parasitologie et Histoire naturelle médicale.....	BLANCHARD
Pathologie et thérapeutique générales.....	BOUCHARD
Pathologie médicale.....	BRISAUD
Pathologie chirurgicale.....	DEJERINE
Anatomie pathologique	LANNELONGUE
Histologie.....	PIERRE MARIE
Opérations et appareils.....	PRENANT
Pharmacologie et matière médicale.....	QUENU
Thérapeutique.....	POUCHET
Hygiène.....	GILBERT
Médecine légale.....	CHANTEMESSE
Histoire de la médecine et de la chirurgie.....	THOINOT
Pathologie expérimentale et comparée.....	GILBERT BALLEL
	ROGER
	HAYEM
Clinique médicale	DIEULAFOY
	DEBOVE
	LANDOUZY
	HUTINEL
Maladies des enfants.....	JOFFROY
Clinique des maladies mentales et des maladies de l'encéphale.....	GAUCHER
Clinique des maladies cutanées et syphilitiques..	RAYMOND
Clinique des maladies du système nerveux.....	LE DENTU
	RECLUS
Clinique chirurgicale	SEGOND
	N.
Clinique ophtalmologique.....	DE LAPERSONNE
Clinique des maladies des voies urinaires.....	ALBARRAN
	PINARD
Clinique d'accouchements.....	BAR
	RIBEMONT-DESSAIGNES
Clinique gynécologique.....	POZZI
Clinique chirurgicale infantile.....	KIRMISSON
Clinique thérapeutique.....	ALBERT ROBIN

Agrévés en exercice.

MM.			
AUVRAY	CUNEO	LAUNOIS	NOBECOURT
BALTHAZARD	DEMELIN	LECENE	OMBREDANNE
BRANCA	DEGREZ	LEGRY	POTOCKI
BEZANÇON (F.)	DUVAL (PIERRE)	LENORMANT	PROUST
BRINDÉAU	GOSSET	LÉPER	RENON
BROCA (ANDRÉ)	GOUGET	MACAIGNE	RICHAUD
BRUMPT	JEANNIN	MAILLARD	RIEFFEL
CARNOT	JEANSELMÉ	MARION	SICARD
CASTAIGNE	JOUSSET (A.)	MORESTIN	ZIMMERN
CLAUDE	LABBE (MARCEL)	MULON	
COUVELAIRE	LANGLOIS	NICLOUX	

Par délibération en date du 9 décembre 1798, l'École a arrêté que les opinions émises dans des dissertations qui lui seront présentées, devront être considérées comme propres à leurs auteurs, et qu'elle n'entend leur donner aucune approbation ni improbation.

AU DOCTEUR L. L. ZAMENHOF

Chevalier de la Légion d'Honneur
Médecin-oculiste à Varsovie

Auteur de la Langue Auxiliaire Internationale Esperanto

A M. TH. CART

Agrégé de l'Université
Professeur au Lycée Henri IV
et à l'Ecole Libre des Sciences Politiques
Président de l'Association des anciens Elèves
de la Faculté des Lettres de Paris
Vice-Président de la Société de Linguistique de Paris

*Président de la Société Française pour la Propagation
de l'Esperanto
Rédacteur en chef de « Lingvo Internacia »*

A MON PRÉSIDENT DE THÈSE

M. LE PROFESSEUR BOUCHARD

Grand-Officier de la Légion d'Honneur

Membre de l'Institut

Médecin des Hôpitaux

Professeur à la Faculté de Médecine

Membre de l'Académie de Médecine

Président du Groupe Médical Espérantiste de France

A MESSIEURS LES DOCTEURS

DEMOSTHEN, Professeur à la Faculté de Médecine de Bucarest (Roumanie),

KABANOV, Privat-Docent de l'Université de Moscou (Russie),

KRIKORTZ, de Stockholm (Suède),

MIKOLAJSKI, de Lwów (Autriche),

HITA, médecin de l'Hôpital de la Arboleda, Bilbao (Espagne),

VARGAS, de Mexico (Mexique),

FRAGA, de Santiago (Chili),

KROÏTA, Professeur à l'Université Impériale de Tokio (Japon),

ROBLOT, secrétaire général du Groupe Médical Espérantiste de France,

ARTIGUES, de Versailles,

MAILLARD, de Sceaux,

PANEL, de Rouen,

A MM.

LE GÉNÉRAL PRIOU, Président de la Société française Esperanto-Croix-Rouge,

LE LIEUTENANT BAYOL, Instructeur à l'École Spéciale Militaire (Saint-Cyr),

ROUSSEAU, Pharmacien à Levallois-Perret,

dont les conseils et documents nous ont été particulièrement précieux pour la rédaction de cette thèse.

Utileco kaj ebleco de internacia helplingvo en medicino

Esperantlingva resumo la doktora disertacio de [Pierre Corret](#) kun tradukitaj eltiraĵoj, klarigoj, komentoj aŭ rimarkoj [interkrampe], retligiloj.

Rimarko : Por faciligi pluan eventualan serĉadon, mi strebis laŭeble aldoni la personajn nomojn, kiuj preskaŭ ĉiam forestis, kaj ankaŭ ligilojn al retpaĝoj, ĉu en EO, ĉu en FR, kaj ankaŭ, kursive, la prononcon: la tilde ~ antaŭ nomo persona aŭ familia signas ties proksimuman prononcon.

===

Fakultato de Medicino de Parizo

Disertacio por doktoriĝo en Medicino

Prezentita la ĵaŭdon 26an de Novembro 1908 je la 13a horo
fare de Pierre CORRET (*pjer kore*), subasistanto de la parizaj hospitaloj, naskiĝinta la 11an de marto 1881.

— -

"UTILITÉ ET POSSIBILITÉ D'UNE LANGUE INTERNATIONALE AUXILIAIRE EN MÉDECINE"

(Utileco kaj ebleco de internacia helplingvo en medicino).

— -

Prezidanto:

Sro [BOUCHARD](#) (*buŝar*), profesoro

Juĝantoj : S-roj

DIEULAFOY (*~djelafŭa*), profesoro

CHANTEMESSE (*~ŝatemes*), profesoro

BALTHAZARD (*baltazar*), agregaciulo

— -

PARIZO
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, rue Lacépède, 33

-

1908

En la paĝoj 5 ĝis 8, Pierre Corret dediĉis sian disertacion al :

- D-ro [Zamenhof](#),

- Prof. [Théophile Cart](#),

- sia prezidanto de disertacio, profesoro Charles Bouchard :

Granda oficiro de la Honora Legio,

Membro de la Instituto (Akademio de sciencoj),

Medicinisto de la Hospitaloj,

Profesoro en la Fakultato de Medicino

Membro de la (FR) [Akademio de Medicino](#)

Prezidanto de la Medicina Esperantista Grupo de Francio

- kaj al profesoroj kaj medicinistoj, kiuj esprimis siajn opiniojn pri la alprenado de internacia helplingvo en medicino.

Kelkaj el ili sufiĉe famiĝis, i.a. Prof. Bergonié (*bergonje* FR), [Lépine](#) (*lepin*), [Charles Richet](#), [Émile-Charles Achard](#) (*emil-sarl aŝar*, 1860-1944, membro de la Akademio de Medicino), [Broca](#) (*broka*) kaj ankaŭ al doktoroj aŭ personoj kiuj subtenis lin per konsiloj aŭ havigo de dokumentoj, i.a. Demosthen, de la Fakultato de Medicino de Bukareŝto (Rumanio), [Kabanov](#) de la Moskva Universitato, [Krikortz](#) el Stokholmo, Mikolajski el Lwów [tiam en Aŭstrio, nun en Ukrainio sub la nomo [Lviv](#)], Hita el Bilbao (Hispanio), Vargas el Meksiko, Kroita, el la Imperia Universitato de Tokio, Fraga el Santiago (Ĉilio), [Maillard](#) (*majar* FR, Fakultato de Medicino de Nancy: FR) el Sceaux (*so*, Francio), generalo Priou, prezidanto de la Franca Societo Esperanto Ruĝa-Kruco, [leŭtenanto Bayol](#) (*bajol*), instruisto en la speciala militlejnejo de Saint-Cyr (~*sa-sir*)

Enhavtabelo de la disertacio (p. 143)

p. 9 — Avant-propos / Antaŭparolo

p. 23 — Les Congrès médicaux internationaux / La internaciaj medicinaj kongresoj

p. 63 — Les ouvrages et journaux médicaux — Les relations médicales internationales /
La medicinaj verkoj kaj gazetoj — La internaciaj medicinaj rilatoj

p. 84 — La Croix-Rouge / La Ruĝa Kruco

p. 101 — Le problème général de la langue internationale /
La ĝenerala problemo de la internacia lingvo

p. 117 — L'Espéranto / Esperanto

p. 135 — Conclusions / Konkludoj

p. 139 — Bibliographie — Bibliografio

===

p. 9

Antaŭparolo

Corret citas, unue, frazon el memuaro, kiun la ĝeneva sciencisto [Ernest Naville](#) adresis en 1899 al la [franca Akademio de sciencoj](#), kies membro li estis : “*Ofte esprimita penso, sed pri kiu oni neniam tro altirus la atenton, estas ke la estigo de internacia lingvo estas unu el la plej urĝaj necesajoj de la aktuala civilizacio*“.

Saman ideon esprimis la sekvantan jaron, [Charles Méray](#), profesoro de la Universitato de Dijon ([Dijono](#)) en noto al la franca Akademio de sciencoj.

p. 10

La 9an de Aprilo 1901, generalo [Hyppolite Sebert](#) (seber) siavice atentigis la Akademion de sciencoj pri la demando de internacia lingvo.

En Germanio, okaze de parolado pri "**La internaciaj devoj de la Universitato**", la 3an de Aŭgusto 1906, prof. Hermann Diels, rektoro de la Universitato de Berlino, ankaŭ atentigis pri la "*ĉefa malfacilaĵo, kiu serioze minacas la ideon de internaciaj interŝanĝoj kaj ŝajnas malebligi la reciprokan interkompreniĝon inter individuoj de malsamaj gepatraj lingvoj*".

p. 11

Multaj aliaj sciencistoj plendis pri la sama problemo. Jam siatempe, en 1728, la fama franca filozofo [Montesquieu](#) (~*monteskie*) skribis: "*La komunikado inter la popoloj estas tiel granda ke ili nepre bezonas komunan lingvon.*"

Rektoro de la edukdistrikto de Dijon, Émile Boirac¹ (*emil būarak*) klare pledis por Esperanto en libro titolita "**Qu'est-ce que l'Esperanto ?**" (Kio estas Esperanto ? Parizo : Presa Esperantista Societo, 1909).

p. 12-13

Corret atentigas ke la internacia lingvo jam estis unuafoje, en 1902, en Dijon, la temo de doktora disertacio: "**D'une langue auxiliaire internationale au point de vue du Droit des Gens**" (Pri internacia lingvo laŭ la vidpunkto de la rajto de la homoj), de [Louis Fauvart-Bastoul](#) (*lŭi fovar-bastul*), doktoro pri juro, advokato en apelacia kortumo, prezidanto de la Ĝenerala Asocio de la Studentoj).

p. 13-14

Poste aperas citaĵoj de profesoro [Joseph Marie Eugène Grasset](#)² (*jozef mari ~eĵen grase*; 1845-1917), de la Universitato de Montpellier, de profesoro Louis Jean-Baptiste Lépine, kies nomo estas ankoraŭ nun fama pro la granda konkurso pri inventaĵoj kiu okazas ĉiujare kadre de la Internacia Foiro de Parizo. [Rimarko H.M. : Eble iom naiva aspektas nun, unu jarcenton poste, la opinio de Lépine, ne pri Esperanto, sed pri la franca, ĉar alinaciaj homoj pensis same por siaj respektivaj lingvoj] : "*Mi opinias ke la alpreno de scienca lingvo fariĝis necesa; ĉar sciencisto ne povas regi ĉiujn lingvojn en kiuj publikiĝas nun memuaroj, kiujn li devas entute legi. Inter la artefaritaj lingvoj taŭgaj por fariĝi la internacia scienca idiomato, Esperanto, dum la lastaj jaroj akiris la unuan lokon; kaj, laŭ mi, tiu lingvo estos treege utila kiel internacia lingvo de la komerco. Tamen ne estas demonstrite, je mia vidpunkto, ke internacia scienca lingvo devas nepre esti artefarita. La franca, tiurilate, havus multajn avantaĝojn.*"

p. 14-15

Aperas poste tute favoraj opinioj de profesoro Soulier (sulje) kaj Jean Alban Bergonié (1857-1925) (Rimarko H.M. : La nomo de Bergonié restas fama pro siaj esploroj kontraŭ kancero. En Bordoza ekzistas Instituto Bergonié ([FR](#)) kies fondo estis oficiale decidita en 1923. Li krome fondis la Esperanto-Grupon de Bordeaux — Bordoza) :

"La utileco de alpreno de internacia helplingvo en medicino ne povas, mi kredas, esti pridubita. Ĝi estas brila kaj fariĝas ĉiutage pli kaj pli urĝa necesaĵo. Pri unu aparta punkto de tiu vasta demando oni povas demonstri tion : Kun la pli kaj pli densa specialigo ĉiutage okazanta, ĉiuj periodaĵoj pri specialaĵo estas legendaj fare de ĉiu fakulo pri tiu specialaĵo. Nu,

¹ Rimarko ne aperanta en la disertacio : Al Boirac ni ŝuldas la esprimon "*Esperanto estas la latino de la demokratio*".

² Kuracisto kaj filozofo; monumento dediĉita al li troviĝas en la sud-Francia urbo Lamalou-les-Bains.

kiel eblas fruktodone legi tiujn periodaĵojn (almenaŭ 10 por la specialaĵoj malplej disvastigitaj), se ĉiu estas skribita en aparta lingvo? Jen pri la nesufiĉeco de poligloto. La specialistoj havas tiom pli da intereso informiĝi pri la malkovroj kaj la progresoj en rilato kun ilia specialaĵo ke tiu ĉi estas pli mallarĝa. Necesas rapide kaj ekzakte koni por pli bone apliki aŭ serĉadi. Nu, tiuj kiuj ne scipovas la lingvojn estas handikapitaj rilate la aliajn, kaj tiuj kiuj scipovas ilin (?) estas devigataj al daŭra trejniĝo, kies tempo estus pli bone uzbla en esplorado. Kiom pli bone estus se ĉiu aŭtoro povus fari resumon pri sia memuaro en helplingvo, kiun publikigus la periodaĵo samtempe kiel la originala memuaro. La memreferaĵoj skribitaj kaj komprenataj de ĉiuj, kia revo! Tio estas tamen realigebla dank' al la helplingvo!“

p. 15-16

Opinio de profesoro Achard (aŝar) : laŭsperte, li konvinkigis pri la utileco de komuna scienca lingvo pro la tempoperdo kaj senutila kroma laboro, kiuj rezultas el plurlingveco en internaciaj kongresoj.

p. 17-18

La opinio de D-ro André Broca, fizikisto kaj medicinisto, senrezerve favora, okupas la tutan paĝon 18 kaj parton el la sekvanta. La nebanaleco de lia opinio indas je kompleta traduko :

“Vi volas fari vian disertacion pri la utileco de Esperanto en medicino, kaj vi tute pravas pritrakti tiun temon. Vi estas juna, sed al la junularo apartenas pritrakto de novaj demandoj kaj altrudo de ili.

Mia opinio pri Esperanto estas tre simpla. Ĝia universala alprenado altigus la povon de asimilado de ĉiu homo je konsiderindaj proporcioj. Kelkaj semajnoj de laboro ebligis al li informiĝi pri la scienco dana, rusa, kaj japana same kiel pri la germana aŭ la angla, anstataŭ tio, kion havigas la simpla kono de nur unu el tiuj du lastaj postulanta multmonatan laboron.

La alprenado de universala lingvo ebligis fakte la kreon de publikaĵoj en kiuj estos analizataj kun sufiĉa klarigo ĉiuj originalaj memuaroj, kaj tiuj publikaĵoj, unu por ĉiu scienco, povos vivi, ĉar ili turnos sin al la tuta mondo.

Kaj mi momente flankenlasas la socian demandon, kiun levas la internacia lingvo. Tio estos grandega progreso kiam lingvo sufiĉe facila por esti enkondukita en la elementan lernejon ebligos al ĉiuj homoj komuniki inter si. Kiam oni bone interkompreniĝas, oni estas tre proksima al neinterbatalado.

Plie, la uzado de racia lingvo, sen esceptoj kaj kun precizaj nuancoj indikitaj per la formo de la vortoj, estos inter la plej utilaj por enigi en la junajn mensojn la sciencan viglecon, tiel nepre necesan en nia jarcento, anstataŭ niaj aktualaj lingvoj, kun iliaj esceptoj, iliaj nekoheraĵoj, iliaj fantaziaj ortografioj, kiuj estas faritaj por encerbigi jam junaĝe la malestimon de la vigleco kaj la kulton de la neinteligenta memoro. La intelekta strebo estos malpli granda por lerni Esperanton kaj fari studojn de liberala kariero, ol por funde lerni unu solan el la aktualaj vivantaj lingvoj, kaj ĝi estos fruktodona, ĉar ĝi liberigos nin el tiu kulto de la pura memoro, kiujn transdonis al ni la nebulaĵoj de la mezepoko kaj kiu haltigas, miaopinie, laŭ ĝena maniero, la nunan evoluadon sub egido [protekto] de niaj nunaj gramatikoj.

Certe niaj nunaj lingvoj respondas al nia literatura artista sento, sed uzi ilin por scienca uzado, kaj precipe por formi junajn mensojn, ŝajnas al mi same absurda kiel fari geometrian strekdesegnon per peniko de pentristo.“

Fine de la p. 18 aperas la opinioj, ankaŭ favoraj, de profesoroj [Alfred Fournier](#) (furnje, **Rimarko H.M.** : ekzistas Instituto Alfred Fournier kontraŭ seksaj malsanoj, fondita en 1923 memore al li) kaj Charles Richet (*ŝarl riŝe*, 1850-1935. **Rimarko H.M.** : Nobelpremio de fiziologio 1913; ekzistas pariza hospitalo de gerontologio memore al li), ambaŭ membroj de la Akademio de Medicino.

Laŭ prof. Richet : *“1° La ebleco de internacia lingvo ne estas utopio; ĉar la sperto pruvas laŭ nediskutebla maniero ke oni povas havi du gepatrajn lingvojn (la provencan kaj la francan, la svedan kaj la finnan, — la bretonan kaj la francan, — la flandran [nederlandan] kaj la francan, ktp, ktp).*

p. 19 (daŭrigo)

2° *En la medicina esplorado kaj studado, multe da tempo estas tutperde uzata por lerni fremdajn nepre necesajn lingvojn. Estas senvaloraĵo uzi du jarojn por lerni la germanan, unu jaron por studi la anglan, por malbone kompreni ilin. En ses monatoj oni sciis paroli, skribi, en Esperanto.*

3° *La instruado de Esperanto, se ĝi estus enkondukita kiel klasika, ebligus en malmulte da jaroj igi tiun lingvon alirebla al ĉiuj homoj, kaj tio simpligus kaj ĝeneraligus ĉiujn medicinajn studojn, tiel malrapidigitaj kaj laborigaj pro la neceso paroli almenaŭ tri treege malfacilajn lingvojn (anglan, francan, germanan).“*

Sekvas en la sama paĝo, kaj 20 kaj 21, la opinio de prof. [Charles-Marie Gariel](#) (*ŝarl-mari garjel*, 1841-1924, profesoro pri fiziko en la Fakultato de Medicino de Parizo, FR):

“Vi demandas mian opinion pri demandoj, kiujn mi opinias povi resumi tiel:

1° *Ĉu estas intereso por la medicinistoj scipovi internacia helplingvo ?*

2° *Ĉu Esperanto povas esti tiu internacia helplingvo ?*

Mi tuj konigas al vi mian opinion pri tiu temo.

Mi ne haltos longtempe pri la utileco de lingvo, kiu estus komprenata kaj parolata de ĉiuj homoj : mi kredas ke tio estas punkto, kiun neniu kontestas. Mi tamen prezentos al vi kelkajn konsiderojn, kiuj baziĝas sur aparta vidpunkto.

Ni konsideru kunvenon de personoj apartenantaj al tri partaj naciecoj A, B kaj C, kaj tiaj ke ĉiu scipovas nur sian gepatran lingvon. Por ke ĉiu el ili komprenu tion, kion diras ĉiu el la du aliaj, necesas ne malpli ol ses interpretistoj : A-B, B-C kaj C-A, kaj ses tradukoj:

A en B, B en C, C en A,

B en A, C en B, A en C.

Se ĉiu el tiuj personoj scipovus nur unu saman lingvon aldone al sia gepatra, ili interkompreniĝus sen interpretisto kaj sen tradukado : la avantaĝo estas eksterduba.

La avantaĝo estas multe pli granda se tiuj personoj apartenas al kvar naciecoj : oni agnoskas ke, en tiu kazo, necesus ne malpli ol ses interpretistoj kaj dekdu tradukoj.

Tiu ĉi kazo ne estas malofta : en multaj internaciaj kongresoj, la akceptataj lingvoj estas la franca, la angla, la germana kaj la itala. Post komunikaĵoj aŭ diskutado, oni foje faras resumon en unu lingvo, sed mi neniam vidis ke oni faris resumojn en tri lingvoj; el tio rezultas ke ĉeestantoj ne povas scii, kio estis dirita. Krome, tiuj resumoj havigas nur nekompletan ideon pri la laboro prezentita kaj pri la rimarkoj, kiujn ĝi inspiris.

Kiom avantaĝe estus se ĉiuj komunikaĵoj estus prezentitaj en unika lingvo komprenata de ĉiu !

Tutsamaj rimarkoj estus fareblaj por la publikigado de libroj, revuoj, ĵurnaloj kies disvastigo estas limigita preskaŭ nur al ilia origina lando se ne estas traduko (...).

Post serioza studado, mi estas konvinkita ke Esperanto posedas ĉiujn ecojn, kiujn oni povas, kiujn oni devas serĉi por internacia helplingvo. Ĝi estas facile lernebla ĉar ĝia gramatiko estas tre simpla : la kreado de vortoj baziĝas sur limigita nombro de radikoj kaj prezentas grandan flekseblecon, kiu ebligas esprimi ĉiujn ideojn kaj kiu, aparte, facile kaj klare adaptiĝas al la esprimado de la sciencaj ideoj; la sperto estas jam vaste farita pro la multaj artikoloj, kiuj jam aperis pri la plej diversaj temoj.

Esperanto farus jam grandajn servojn se ĝi estus lingvo nur skribe uzebla; sed ne estas tiel, ĉar ĝi estas lingvo ankaŭ tre bone uzebla en konversacio : la sperto pri tio estis multfoje farita, precipe dum la grandaj esperantistaj kongresoj.

Pro tio, mi opinias dezirinda la ĝeneraligon de la uzo de tiu lingvo.

Ni povus deziri ke, kiel tio okazis iam, la rolo de internacia lingvo estu konsentita al la franca. Sed oni ne havu iluziojn pri tio : la nunaj rivalecoj inter la popoloj ne ebligas esperi ke povu esti tiel. Ni akceptu la situacion kaj, ĉar tiu solvo estas neesperebla, ni aliĝu al tiu, kiun proponas Esperanto.”

La internaciaj medicinaj kongresoj

Laŭ Pierre Corret, la tendenco al internaciigo de la scienco, pri kiu parolis prof. Diels, el Berlino, manifestiĝas precipe per la disvolviĝo de la internaciaj kongresoj, kaj certe la medicina scienco estas tiu, kiu iras plej avangarde.

Li citas alvokon, kiun membro de la filio de Odessa de la Societo "Espero" de Sankt-Peterburgo sendis al la organiza Komitato de la Internacia medicina kongreso de Parizo (1900) por alpreno de Esperanto samrange kiel la ceteraj lingvoj.

Rimarko H.M. : Mi ne emas retraduki la tuton kiu okupas la parte la paĝojn 23 kaj 25 kaj entute la p. 24, sed se iu leganto povus havigi al mi kopion de la paĝoj 82 kaj 83 de la junia-julia numero de 1898 de "**Lingvo Internacia**", eble tio solvus la problemon. Tamen la aŭtoro de tiu alvoko jam prave atentigis ke pliaj nacioj, do ankaŭ pliaj lingvoj, aldoniĝis, kaj ke por ili esprimiĝis demando pri samrajta pritraktado, kaj ke, sekve, iam, oni devus limigi ilian nombron. Li mencias ke internaciaj kongresoj, jam tiutempe, okazis nur en tri lingvoj.

Pierre Corret mem spertis la malbonan interkompreniĝon okaze de la Internacia Kongreso de Kirurgio en kiu partoprenis plej famaj fakuloj el ĉiuj mondpartoj. Li kun alia kolego imagis, pro malfrua alveno, ke ili ne trovos lokon en la amfiteatro sed, kiam ili eniris, ili konstatis ke estis apenaŭ dudeko da partoprenantoj sidantaj funde de la vasta amfiteatro. Ili pacience aŭskultis italan profesoron, kiu esprimiĝis en la franca : *“Estis al ni preskaŭ neeble kompreni ion ajn, kaj el la konfuza ĥaoso de silaboj elstaris kelkfoje la vorto "sacrum" prononcita laŭ itala maniero ["sakrum"], kio donis iom komikan aspekton al la grava disertacio de la profesoro“* (**Rimarko H.M.** : en la franca, tiu vorto prononciĝas "sakrom"). *“Se ni ne komprenis kelkajn frazerojn de tiu komunikaĵo, tamen farita en la franca, kion povis kompreni el ĝi la angloj, la germanoj, la rusoj, la serboj aŭ la bulgaroj, eĉ se ili scipovis la francan ? Sendube absolute nenion, — kaj probable pro tio, dum la seanco mem, multaj kongresanoj pacience promenis en la korto de la Fakultato, sendube atendente sian vicon legi siajn komunikaĵojn, aŭ ke iu samlandano parolu en lingvo por ili komprenebla.“*

Pierre Corret kaj lia kolego tute seniluziiĝis. En la konkludo de tiu ĉapitro, li humure citas jenan difinon jam aŭditan de li pri internacia kongreso : *“Ceremonio kie kunvenas individuoj de diversaj naciecoj, kiuj ne interkompreniĝas, por aĉeti per sia ĉeesto la rajton aperigi siajn komunikaĵojn en la kongresprotokolo kaj favorpreze partopreni samokaze en kelkaj festoj kaj kelkaj ekskursoj“.*

(Traduko) D-ro J. Lucas-Championnière (*lika-ŝapjonier*), kiu devis prezidi la 3an kongreson de la Internacia Societo de Kirurgio, skribis en "**Journal de Médecine et de Chirurgie pratiques**" (Ĵurnalo de praktikaj medicino kaj kirurgio) de la 25a de oktobro 1908, pri la lasta kongreso de tiu societo okazinta en Bruselo:

“La malfacilaĵo de la mikseco de lingvoj ne estis venkita, sed estis malgravigita per bone faritaj resumoj en tri lingvoj por ĉiu raporto. Estis eble, se ne sekvi la tuton, almenaŭ parton el la diskutado, eĉ sen scii la tri oficialajn lingvojn : la anglan, la germanan kaj la francan.

Estas nekontesteble, fakte, ke la lingvomulteco neniigas parton el la internaciaj kunvenoj. La latina ne plu ekzistas kaj Esperanto ne ankoraŭ ekzistas.“

“Ĉu oni ne povas esprimi pli nete kaj pli frape la ĝenon, kiun alportas la lingvodiverseco en la internaciaj kongresoj ?“, skribas Pierre Corret.

“Esperanto ne ankoraŭ ekzistas“, diras D-ro Lucas-Championnière, — tiusence, estas certe ke ĝi ne estas ankoraŭ ĝenerale alprenita en la internaciaj kongresoj, ĉar sur multe da aliaj terenoj la pruvoj de ĝia ekzistado kaj de ĝia vicleco montriĝas ĉiutage pli multnombraj;

apartenas al la medicinaj kongresoj mem havigi al ĝi ekziston per ĝia aldono al la nombro de la lingvoj, kiujn ili oficiale akceptas. Kaj baldaŭ "*la malfacilaĵoj de la diverseco de la lingvoj*" estos ne nur malgravigita per nesufiĉaj resumoj en tri aŭ kvar lingvoj — p. 29 — ebligantaj sekvi nur parton el la diskutoj, sed tute kaj definitive venkita per la internacia idiomato, kiu igos ebla kaj facila al ĉiuj kongresanoj la tujan komprenon de ĉiuj raportoj aŭ komunikaĵoj kaj la efektivan partoprenon en ĉiuj diskutoj de la kongresoj.

Ĉar la franca estas ordinare inkluzivita inter la oficiale akceptitaj lingvoj en la apartaj kongresoj, la francaj medicinistoj eble malpli facile konscias, ol iuj el iliaj eksterlandaj kolegoj, pri la malfacilaĵoj, kiun la diverseco de la lingvoj alportas en la internaciaj kongresoj.

Corret substrekas poste la avantaĝon, kiun ĝuas samprofesianoj kies lingvo estas ankaŭ alprenita. Tio estas grava por ili.

“Sed rusoj aŭ rumanoj, ekzemple, estas devigataj prezenti siajn laboraĵojn en lingvo, kiu estas al ili fremda kaj kiun li tamen devas regi sufiĉe perfekte por pritraki temojn ofte tre specialajn.

Kiom da francaj kuracistoj, estus kapablaj, en internacia kongreso, prezenti siajn komunikaĵojn en — p. 30 — la germana, la angla aŭ la itala, eĉ se ili kapablas pli malpli bone kompreni unu aŭ alian el tiuj lingvoj? Estas tute alia afero kompreni lingvon kaj scipovi mem uzi ĝin.“

Ne estas mirige ke la bezono de internacia lingvo estas pli sentebla ĉe la nacioj, kies lingvo ĝenerale ne estas akceptataj en internaciaj kongresoj.

Corret citas poste, ekzemple, artikolon el la **“Ĵurnalo de la rusa medicina societo fondita memore al Pirogov”** (n^o 7, 1907), kies Esperanto-tradukon bonvolis havigi al li ties aŭtoron, D-ro Kabanov, privat-docent [libera profesoro] de la Universitato de Moskvo:

“Multaj el tiuj, kiuj partoprenis en medicinaj internaciaj kongresoj certe raportis pri ili tre malbonan impreson. Ĉiu komunikaĵo, raporto aŭ observaĵo estas ne de ĉiuj kongresanoj bone komprenita; granda nombro el ili ne komprenas ilin, ĉar kia ajn estas la lingvo en kiu esprimiĝas la oratoro, ĝi estas nekonata de multaj el ili. Rezultas ke la germanaj raportoj estas studataj kaj pridiskutataj fare de la germanoj, la francaj raportoj fare de la francoj, ktp, laŭ la lingvoj akceptataj en la kongreso. Ni ne insistas pri tiu fakto ke povas partopreni en la internaciaj kongresoj nur la medicinistoj kiuj scipovas almenaŭ unu el la akceptataj lingvoj — p. 31 — sed ke la plimulto el la medicinistoj de ĉiu lando estas en absoluta neebleco partopreni en ili pro nescio de fremdaj lingvoj. La medicinistoj mem kies lingvo estas akceptata en la kongreso ne povas eltiri grandan profiton el internacia kongreso se ili ne scipovas ĉiujn lingvojn akceptataj en tiu kongreso.” Piedonoto tie indikas ke kvin lingvoj estis akceptataj en la internacia kongreso de Madrido kaj ke, pro la kreskanta nombro de nacioj kaj de akceptataj lingvoj: *“La kongreso konkludis ke estis necese trovi rimedon por eliri el tiu situacio, kiu certe malutilas al la disvolviĝo de la internaciaj kongresoj.”*

Daŭrigo de la artikolo de D-ro Kabanov: *“Ĉar en ĉiu lando estas naciaj medicinaj kongresoj, kongresoj de medicinistoj francaj, rusaj, italaj, germanaj, oni ne tre bone vidas, kiun avantaĝon povas havi en partopreno en internaciaj kongresoj, ekzemple, germana medicinisto, por interŝanĝi ideojn kun aliaj germanaj medicinistoj; li povus same fari en sia propra lando, en siaj naciaj kongresoj, kun malpli granda foroforo de fortoj, mono kaj tempo. La celo de la internaciaj medicinistaj kongresoj estas la interŝanĝo de ideoj inter kuracistoj de diversaj landoj kaj de diversaj skoloj, sed ĉar en la nunaj kongresoj oni uzas plurajn lingvojn, tiu celo estas tre malgrandparte atingita. Se tamen, malgraŭ tio, oni plue organizas internaciajn medicinajn kongresojn, tio pruvas la bezonon de reciprokaj rilatoj kaj de komunikado inter la — p. 32 — diverslandaj medicinistoj. Ne estas bezonate pruvi, ke la estigo de internacia lingvo estus epokfara en la historio de la medicinaj kongresoj kaj donus impulson al ilia disvolviĝo pro la alirebleco al la granda amaso de la medicinistoj, kiu rezultus el tio; la esencaj celoj kaj rolo de la internaciaj kongresoj estus tiam sufiĉe plenumita.*

Jen kial ŝajnas al mi tre dezirinde ke la lingvo Esperanto disvastiĝu laŭeble plej frue inter la medicinistoj de la diversaj landoj, kaj ke ĝi estu ankaŭ laŭeble plej frue akceptata kiel oficiala lingvo de la medicinistaj kongresoj. Nur tiam tiuj kongresoj vere atingos sian celon, ĉar ĉiuj medicinistoj de ĉiuj landoj kaj naciecoj havos eblecon partopreni en ili."

Profesoro Demosthen, de la Fakultato de medicino de Bukareŝto, inspektoro pri sano de la rumana armeo, same skribis al la prezidanto de la Esperantista Societo de Rumanio : [resumo] Iam la medicina lingvo en preskaŭ ĉiuj universitatoj kaj medicinaj lernejoj estis la latina. En kelkaj jardekoj, ĝi estis iom post iom forlasita kaj anstataŭigita per io ne egalvalora, se ne pli bona. Tio estas bedaŭrinda fakto, kiu ne estis sen negativaj konsekvencoj por la instruado kaj por la progreso de la medicino. Ne facile troveblas tradukistoj, kiuj povas konigi la medicinan literaturon; en grandaj internaciaj kunvenoj, kie gravegaj demandoj estas pritraktataj diverslingve, ne poligloto povas nur ĉeesti sen partopreni aktive, sciante plejofte nenion pri la enhavo de la diskutoj kaj ĉefe de la argumentoj. Serioza partopreno estas neebla eĉ al tre kompetenta fakulo pri la pritraktita temo. De ses ĝis ok monatoj estas necesaj por disponi je publikaĵoj kaj tiel koni la enhavon de la komunikaĵoj. Nur tiam eblas al fakulo pristudi la temon kiu interesas lin.

Prof. Demosthen raportas pri propra sperto en la internacia kongreso de — p. 34 — Higieno kaj Demografio okazinta la antaŭan jaron, de la 23a ĝis la 29a de septembro 1907, en Berlino, kie li aŭdis komunikaĵojn en la angla, germana, franca kaj itala. “*Por profite partopreni en tia kongreso, germano, anglo, franco kaj italo devas regi tri fremdajn lingvojn, kaj se temas pri ruso, turko, norvego, japano aŭ rumano, al ili estos necesa la kono de kvar malsimilaj idiomoj aldone al ilia gepatra. Mi ne kredas ke tiel poliglota membro estis renkontebla en tiu kongreso.*” Kelkaj kongresanoj scipovis sendube duan lingvon aldone al ilia propra. Tre multaj medicinistoj, kaj preskaŭ la plejmulto el la germanaj medicinistoj scipovis nur sian propran lingvon. Ĉiuj el ili akordiĝas por agnoski ke estis ĝeno kaj malfacilaĵoj. “*Notindas fakte ke en ĉiuj landoj, la plimulto el la medicinistoj estas unulingva.*” La traduko el la rumana originalo de tiu artikolo de prof. Demosthen aperis en “**Rumana Esperantisto**” de aprilo 1908.

Pro tiu situacio, prof. Demosthen faris proponon — p. 36 — por ke la kongreso decidu pri alprenado de Esperanto. Ĝia prezento antaŭ la kongreso ne povis okazi pro tio ke ĝi ne estis prezentita antaŭe al komisiono, laŭ la kongresregularo.

Pierre Corret raportas poste pledojn de diversaj organizoj por la alprenado de Esperanto por la internaciaj kongresoj, rilatoj kaj interŝanĝoj, i.a. — p. 37 — por la Internacia medicina kongreso de Parizo (1900), la kongreso de dungitoj en Londono (1905), de farmaciistoj en Kembriĝo (1907, kadre de la 3a UK).

Li listigas poste, en la p. 38 kaj 40, asociajn kaj profesiajn kongresojn, kiuj rekomendis aŭ akceptis la uzon de Esperanto por la kongresoj kaj internaciaj rilatoj :

Kongreso de la *Franca Ligo de Instruado* (Liono, 25-28 de Septembro 1902).

Kongreso de *Aŭtomobilismo* (Parizo, Junio 1903).

Unua Kongreso de *Farbistoj de Konstruaĵoj kaj Ŝildoj* (Grenoblo, Septembro 1904).

Unua internacia Kongreso de *Fizioterapio* (Lieĝo, 11-15 de Aŭgusto 1905).

Tria internacia Kongreso de la *Libera Penso* (Parizo, 4-7 de Septembro 1905).

Unua internacia Kongreso la *Tutmonda Ekonomika Ekspansio* (Mons, 24-28 de Septembro 1905).

p. 38

Kongreso de la *Instruistoj* (Lieĝo, 1905).

Socialista Kongreso (Châlon-sur-Saône, 1905).

Kongreso de la *farblaboristoj* (Saint-Quentin, 1905).

Unua internacia Kongreso de la *dungitoj* (Londono, Aprilo 1906).

Unua nacia Kongreso de la *Hispanaj Societoj de Socialistaj Junuloj* (Bilbao, Aprilo 1906).
 Kongreso de la *ceramiklaboristoj* (Julio 1906).
 Internacia Kongreso de la *Unuiĝo de Societoj de Kristana Aktivado* (Ĝenevo, Aŭgusto 1906).
 Kongreso de la *Internacia Dentista Federacio* (Ĝenevo, Aŭgusto 1906).
 Franca Kongreso de la *Paco* (Liono, 15-18 de Aŭgusto 1906).
 Kongreso de la *Ĉapelistoj* (Septembro 1906).
 Kongreso de *Amieno* (Oktobro 1906).
 Internacia Kongreso de la *Muzikartistoj* (Milano, 1906).
 Internacia Kongreso de la *Studentoj* (Bordojo, 1907).
 Deksesa Universala Kongreso de la *Paco* (Munkeno, 26-30 de Septembro 1907).
 Dekdua internacia Kongreso por la *Dimanĉa Ripozo* (Munkeno, 26-30 de Septembro 1907).
 Kongreso de la *Diamentistoj* (Amsterdamo).
 Internacia *Kontraŭalkohola* Kongreso de (Stokholmo, Septembro 1907).
 Kongreso de la *Porpacaj Wurtenbergaj Societoj* (Esslingen, Oktobro 1907).
 Kongreso de la *Bicikla Hispana Unuiĝo* (1908).
 Kongreso de la *Asocioj de Komercistoj kaj Industriistoj de Francio* (Le Puy, 1908).

Aparte menciinda estas la kazo de la D-ro Krikortz, el Stokholmo, kiu partoprenis sinsekve en la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro, kaj en la 1a Internacia Kongreso de Fizioterapio. Pri tio skribis D-ro Krikortz : “*Mi ne renkontis malfacilaĵojn kaj prezentis mian komunikaĵon en Esperanto, ĉar Esperanto estis oficiale akceptita kun la aliaj lingvoj. La artikolo 8 de la regularo estas tiel farita : « La akceptataj lingvoj en la Kongreso estas la franca, la flandra [nederlanda], la germana, la angla kaj Esperanto. Laŭeble, estos farita, zorge de la sekretarioj, resumo en la franca de la paroladoj faritaj en alia lingvo. »*” Ankaŭ la itala estis poste aldonita pro la aktiva partopreno de Italio. — p. 41 — Krikortz supozis ke ankaŭ la hispana estis akceptita, sed ŝajnis al li ke li ne aŭdis la hispanan lingvon “*meze de la babela konfuzo*”.

“*Mi alvenis el la Esperantista Kongreso de Bulonjo ĉe Maro, kie ĉiuj kongresanoj facile interkompreniĝis, kaj tiom pli vigla estis por mi la kontrasto partopreni en kunvenoj kie la plimulto el la membroj povis interkompreniĝi nur parte kaj malfacile. Necesas supozi ke la plej granda nombro el la kongresanoj eble komprenis iom la francan, sed la eta resumo de la komunikaĵoj farita en la franca estis tute malsufiĉa.*”

Post legado de mia komunikaĵo en unu el la sekcioj de la kongreso, estis demandite al miaj aŭskultantoj ĉu necesas fari resumon en la franca. La respondo estis negativa, kaj mi havas kialon por supozi ke mi estis komprenita.” La originalo de tiu deklaro de D-ro Krikortz estis en Esperanto.

Pierre Corret klarigas ke tiu konkludo ne estas miriga, ĉar Esperanto estas tiel farita ke ĉiu mezklera eŭropano povas unuavide kompreni, sen antaŭa studado, la ĝeneralan sencon de teksto redaktita en tiu lingvo pro la internacieco de la vortrezoro. — p. 42 — Li poste citas la konatan eldiron de la granda rusa verkisto [Leo Tolstoj](#), kiu lernis ĝin dum kelkaj horoj kaj kapablis kompreni tekston en tiu lingvo, kaj fine — p. 43 —, li aldonas kelkajn klarigojn pri kelkaj literoj el la E-alfabeto, kies prononco estas malsimila al tiu de la franca.

Pri la kuracado per varmo.	Sur la médication par la chaleur.
<p>Inter la fizikaj kuraciloj la altigita temperaturo ludas gravan rolon kaj emas ampleksi pli kaj pli multajn regionojn en la medicino.</p> <p>Ĉi-okaze mi volas iom paroli pri ĝia bakterimortiga ebleco en kelkaj malsanoj, antaŭe malfacile sanigitaj per kemiaj iloj.</p> <p>Unu el tiuj malsanoj estas la ŝankro, <i>ulcus venereum simplex</i>. La unuaj provoj per varmo sanigi la ŝankron estis faritaj jam en la 1880-a jardeko kaj eĉ pli frue de Benoit, Hebra, Simmons, Aubert, Lormand, Arnazon kaj Vignerone kaj aliaj, sed vere praktika metodo unue estis elpensita de P-ro Edvard Welander, ĉefkuracisto ĉe la malsanulejo St-Goran en Stockholm, al kiu ni nun ŝuldas kuracilon multfoje pli efikan ol ĉiuj aliaj. (La metodo de Audry eble egalas en certaj cirkonstancoj. Dum siaj unuaj provoj li nenion sciis pri siaj antaŭuloj, kaj lia metodo tiel estas tute originala).</p> <p>Li estis alkondukita al ĝi dum sia penado en la jaro 1892</p>	<p>Entre les agents physiques, la température élevée joue un rôle important et tend à embrasser des régions de plus en plus nombreuses dans la médecine.</p> <p>Je veux parler un peu ici de son pouvoir bactéricide dans quelques maladies difficilement guéries auparavant par des agents chimiques.</p> <p>Une de ces maladies est le chancre, <i>ulcus venereum simplex</i>. Les premières tentatives pour guérir le chancre par la chaleur avaient été faites déjà en 1880-1890 et même plus tôt par Benoit, Hebra, Simmons, Aubert, Lormand, Arnazon et Vignerone et d'autres, mais une méthode vraiment pratique a été imaginée pour la première fois par le Professeur Edvard Welander, médecin en chef de l'hôpital St-Goran à Stockholm à qui nous devons maintenant un traitement beaucoup plus efficace que tous les autres. (La méthode d'Audry l'égale peut-être en certaines circonstances). Pendant ses premiers essais il ne savait rien de ses prédécesseurs, et sa méthode est ainsi tout-à-fait personnelle).</p> <p>Il y avait été conduit en s'efforçant en l'année 1892 de</p>

<p>sanigi virusan bubonon, kiu spitis dumonatan kuracadon. Li tiam memoris kelkajn eksperimentojn faritajn de W. BOECK en la jaro 1872, kiu pruvis la mortigan influon de varmo je la ŝankra viruso (aŭ la sifilisa laŭ BOECK, kiu ja estis dualisto). Welander ankaŭ vidis kelkajn okazojn de ŝankro, kiuj propramove saniĝis dum sufiĉe alta febro intervenanta.</p> <p>Apogante je bakteriologiaj eksperimentoj kaj praktikaj spertoj, WELANDER ellaboris sian metodon, kiun li jam havis okazon preparoli dum la dua internacia kongreso dermatologia en Wien 1892 (Verhandlungen).</p> <p>Li uzas kiel varmigilon akvon tiom varmigitan, ke ĝi donas al la ulcero temperaturon de 41 gradoj Celsius. La akvon li trafluigas tra plumbaj flekseblaj tuboj de malgranda diametro, kiuj povas formiĝi laŭ ĉiuj eblaj supraĵoj kaj anguloj (tubo de Leiter).</p> <p>Post purigo de l' ulcero, se bezone per skrapilo (laŭ PETERSEN) kaj per fortondo de la randoj subfositaj, oni metas sur l'ulceron malgrandajn pecojn da kotonon trempitajn en varman akvon kaj ilin premas precize</p>	<p>guérir un bubon virulent qui persistait en dépit d'un traitement de deux mois. Il se rappela alors quelques expériences faites en 1872 par W. Boeck, qui prouva l'influence destructrice de la chaleur sur le virus chancreux (ou syphilitique suivant Boeck, qui d'ailleurs était dualiste). Welander aussi observa quelques cas de chancre qui guérissent d'eux-mêmes pendant une assez forte fièvre intercurrente.</p> <p>S'appuyant sur des expériences bactériologiques et sur des essais pratiques, Welander élaborera sa méthode dont il eut déjà l'occasion de parler lors du deuxième congrès international de dermatologie à Vienne 1892 (Verhandlungen).</p> <p>Il emploie comme agent thermique de l'eau suffisamment chauffée pour donner à l'ulcération une température de 41 degrés Celsius. Il fait passer l'eau à travers des tuyaux de plomb flexibles de petit diamètre, qui peuvent prendre la forme de toutes les surfaces et angles possibles (tubes de Leiter).</p> <p>Après nettoyage de l'ulcération, au besoin à la curette (d'après Petersen) et par l'excision des bords décollés, on y met de petits morceaux de coton trempés dans de l'eau chaude et on les applique</p>
---	--

<p>al ĉiuj partetoj de ĝi. Poste oni ĉirkaŭas ekz. la tutan membron per kelkaj tavoloj da trempita kotono, vindas la tubeton ĉirkaŭ ĝi, ĉirkaŭmetas ankoraŭ tavolon da malseka kotono kaj kovras laste la tuton per gutaperka ŝtofo. Tia bandaĝo estas ŝanĝata trifoje en la tago por doni al la paciento okazon urini, ktp.</p> <p>La akvo estas varmigata en aparato elpensita de D-ro BERLIEN kaj de li nomita hidrotermostato. La aparato konsistas el kupra akvujo kun konduktoj por akvo kaj gaso kaj kun aŭtomataj reguligiloj por ambaŭ. La alveno de la gaso al bruliloj de Bunsen laŭiĝas enhidrangaj termometroj reguligaj kaj l' alfluo de l'akvo pernaĝa klapo¹.</p> <p>Per la reguliga termometro donante al la akvo en l'akvujo la temperaturon de 50° C. oni atingas apud la ulcero 41° C., kaj tiu estas konstanta dum tempo kiu ajn. Per unu aparato</p> <p>(1) Tiu ti aparato estas fabrikata de la instrumentisto Alb. Stille en Stockholm. La kosto estas por granda aparato kun du reguligiloj 244 frankoj; por malgranda aparato kun unu reguligilo 173,50 frankoj.</p>	<p>exactement sur toutes les parties. Ensuite on entoure par ex. le membre tout entier de quelques couches de coton trempé, on enroule le tube autour de lui, on l'entoure encore d'une couche de coton humide et on couvre enfin le tout d'une étoffe en gutta-percha. Ce pansement est changé trois fois par jour, pour donner au patient l'occasion d'uriner, etc.</p> <p>L'eau est chauffée dans un appareil inventé par le Dr Berlien et nommé par lui hydro-thermostat. L'appareil consiste en un réservoir de cuivre avec des conduits pour l'eau et le gaz et des régulateurs automatiques pour l'un et l'autre. L'arrivée du gaz aux brûleurs de Bunsen dépend de thermomètres régulateurs à mercure et l'arrivée de l'eau est réglée par un robinet à flotteur¹.</p> <p>Au moyen du thermomètre régulateur, en donnant à l'eau dans le réservoir la température de 50° C., on atteint auprès de l'ulcération 41° C., et cette température reste con-</p> <p>(1) Cet appareil est construit par le fabricant d'instruments Alb. Stille à Stockholm. Le prix est, pour un grand appareil avec deux régulateurs, 244 francs; pour un petit, avec un seul régulateur, 173,50 frs.</p>
---	--

<p>oni povas kuraci samtempe du malsanulojn.</p> <p>Post mallonga tiela kuracado la ulcero prezentas tute alian eksterajn. Jam post dek horoj la flava fundo malaperis, post unu tago ĝi ŝajnas pura kaj komencas pleniĝi, la infiltracioj ĉirkaŭantaj malaperis kaj la sekrecio preskaŭ tute ĉesis. Post du tagoj la virusa ulcero estas kun maloftaj esceptoj tute purigita kaj ŝanĝiĝis en ulceron plenigantan per malgrandaj sangemaj granulacioj. Ĝi komencas jam saniĝi. Se la ulcero tamen estis granda kun multaj subfositaj randaĵoj, ekz. en granda virusa bubono, povus okazi ke ia parteto ankoraŭ sin montras suspekta. Tiaokaze oni estu prudenta daŭrigi la kuracadon ankoraŭ dum unu tria tago, por ne deviĝi rekomenci poste. Daŭrigo ankaŭ, se al tio oni havas tempon, akcelas la sanigon de pura ulcero. Post ĉeso de la varmo-kuracado oni daŭrigas per ia pulvoro, ekz. dermatolo.</p>	<p>stante pendant quelque temps que ce soit. A l'aide d'un seul appareil on peut traiter deux malades.</p> <p>Après un emploi peu prolongé d'une telle médication, l'ulcération présente un tout autre aspect. Déjà après dix heures le fond jaune a disparu; après un jour il paraît propre et commence à se combler: les infiltrations voisines ont disparu et la sécrétion a presque entièrement cessé. Après deux jours l'ulcération virulente est, sauf de rares exceptions, tout-à-fait nettoyée, et s'est changée en une ulcération en train de se remplir de petites granulations qui saignent facilement. Elle commence déjà à guérir. Si pourtant l'ulcération était considérable avec de nombreuses anfractuosités décollées, p. ex. dans un grand bubon virulent, il pourrait arriver que quelque petite partie se montre encore suspecte. Dans ce cas qu'on ait la prudence de continuer encore le traitement pendant un troisième jour, pour n'être pas obligé de recommencer plus tard. Cette continuation, si on en a le temps, accélère aussi la guérison de l'ulcère nettoyé. Après cessation du traitement par la chaleur, on continue par l'emploi de quelque poudre, p. ex. le dermatol.</p>
--	---

p. 48

<p>La paciento povas forlasi la malsanulejon kaj sin kuraci hejme</p> <p>Sed por tiel bona rezultato necese estas, ke la varmo efektive atingu la ulceron. Tio ne okazas tra la haŭto, kiu malbone kondukas la varmon. Pro tia kaŭzo estas necese, kiel mi antaŭe diris, ke oni fortondu randojn subfositajn. Same oni ne povas kuraci ulcerojn kaŝitajn sub la prepucion la okazoj de fimozo. Tiam oni estas devigata uzi alian metodon nome per varmaj lavadoj. Maldika katetro, kiu kondukas la akvon el supre pendigita vazo estas enŝovita en la spacon prepucian. Tra tiu oni trafluigas akvon havantan en la vazo temperaturon de ĉirkaŭ 45° C. La paciento devas dum la lavado kunpremi la <i>meatus proeputii</i>, por ke ĉiuj partoj estu atingitaj de la akvo. Se plu li havas ragadajn ŝankrojn, li ankaŭ devas trempi la membron en varman akvon. La lavado devas fariĝi per almenaŭ unu litro ĉiuhore. Post kelkaj tagoj, la prepucio povas retiriĝi. La ulceroj tiam komencas puriĝi aŭ estas eĉ jam sanigitaj. Kelkafoje oni devas daŭrigi per la tubetoj kiel supe priskribite.</p>	<p>Le patient peut quitter l'hôpital et se traiter chez lui.</p> <p>Mais pour un si bon résultat, il est nécessaire que la chaleur atteigne effectivement l'ulcération. Cela n'a pas lieu à travers la peau qui conduit mal la chaleur. C'est pour cette cause qu'il est nécessaire, comme je l'ai dit antérieurement, d'exciser les bords décollés. De même on ne peut traiter des ulcérations cachées sous le prépuce dans les cas de phimosis. On est alors obligé d'employer une autre méthode, celle des lavages chauds. Un mince cathéter, qui conduit l'eau d'un vase suspendu est glissé dans l'espace préputial. On y fait couler de l'eau ayant dans le vase une température d'environ 45° C. Le patient doit pendant le lavage comprimer le <i>meatus proeputii</i>, pour que toutes les parties soient atteintes par l'eau. S'il a de plus des ragades, il doit tremper tout le membre dans l'eau chaude. Le lavage doit employer au moins un litre par heure. Après quelques jours le prépuce peut se retirer. Les ulcérations commencent alors à se nettoyer, ou sont même déjà guéries. Quelquefois on doit continuer à l'aide des petits tubes, comme il a été ci-dessus décrit.</p>
--	--

p. 49

<p>La metodo egale povas uziĝi por multenombraj, diverslokaj, diversformaj, fagedenaj aŭ gangrenaj ŝankroj nur je unu kondiĉo, ke la varmo povu atingi ĉiujn partetojn, ĉiujn angulojn de ili; kaj tiun kondiĉon ne estas malfacile plenumi, se bezone per operacietoj. Eĉ mi vidis kuraciĝi kun la plej bona rezultato ŝankrojn en la malsupra parto de la rektintesto. Nur la ŝankroj en la uretro povas iafoje starigi malhelpojn nevenkeblajn. Oni tiam deviĝas krome uzi bacilojn jodoformajn.</p> <p>La profito per la paciento de tia rapida kaj certa metodo detruu la virusecon de la ŝankro estas evidenta. La restado en la malsanulejo estas kun varmometodo por ŝankroj sen komplikaĵoj nur la kvarono de la tempo, kiun postulas aliaj metodoj.</p> <p>Alia profito, eble la plej granda, estas la cirkonstanco, ke per la varmometodo la paciento preskaŭ certe evitos bubonon, se tian li ne havis en la komenco de la kuracado. La apero de bubono ja dependas de la viruseco de la ulcero kaj post la detruo de la viruso, per la varmo pli rapide ol per ia alia kuracilo okazinta,</p>	<p>La méthode peut également être mise en usage pour des chancres multiples, disséminés, polymorphes, phagédéniques ou gangréneux, à une seule condition, c'est que la chaleur puisse atteindre toutes leurs parties, tous leurs recoins, et cette condition n'est pas difficile à remplir, au besoin par de petites opérations. J'ai même vu guérir, avec le meilleur résultat, des chancres de la partie inférieure du rectum. Seuls les chancres de l'urèthre peuvent parfois opposer des difficultés invincibles. On doit alors en outre employer des crayons d'iodeforme.</p> <p>Le profit pour le patient de cette façon rapide et certaine de détruire la virulence du chancre est évident. Le séjour à l'hôpital est avec le traitement par la chaleur, pour des chancres sans complications, seulement le quart du temps qu'exigent d'autres méthodes.</p> <p>Un autre profit, peut-être le plus grand, est cette circonstance, que par la chaleur le patient évitera presque certainement le bubon, s'il n'en avait pas au début du traitement. L'apparition du bubon dépend en effet de la virulence de l'ulcération, et après la destruction du virus, effectuée plus rapidement par la chaleur que</p>
--	---

<p>nenia bubono povas disvolviĝi.</p> <p>Sed la bubono estas ja la plej timinda sekvo de la ŝankro.</p> <p>Vera kontraŭindiko kontraŭ la metodo ne ekzistas. Ĝi kaŭzas nur iafoje unu malagrablajon, eviteblan per zorgemo dum la uzado de la metodo, nome brulajn vezikojn sen signifo. Komprenoble, la uzo de la metodo estas limigita al la malsanulejo.</p> <p>Mi jam diris, ke ankaŭ aliaj esploristoj provis per varmo kuraci la ŝankron. Precipe ili proponis, kiel AUBERT kaj LORMAND, daŭrajn varmegajn banojn. La rezultatoj tamen estis nesufiĉaj kaj ankaŭ neseriskaj. Dum tia bano ekz. estus necese meti malvarmajn kompresojn sur la kapon, doni korfortigilojn ktp pro timota sinkopo.</p> <p>Nur per unu alia metodo, tiu de AUDRY, publikigita en la jaro 1896-a, oni povas atingi bonajn eĉ bonegajn rezultatojn. Laŭ tiu ĉi metodo oni varmigas la antaŭe skrapile purigitan ulceron per termokaŭterizilo. La platina finaĵo, hejtigita ĝis ruĝeco, estas tenata dum dek-kvin sekundoj ĉirkaŭe 4 mm super la ulcero. Oni devas eviti</p>	<p>par tout autre agent, aucun bubon ne peut se développer. Or le bubon est certainement la suite la plus redoutable du chancre.</p> <p>De véritable contre-indication à la méthode, il n'en existe pas. Elle ne cause que parfois un désagrément évitable avec du soin pendant l'emploi du traitement, des phlyctènes de brûlures insignifiantes. On le comprend, l'emploi de cette méthode est limitée à l'hôpital.</p> <p>J'ai déjà dit que d'autres expérimentateurs avaient essayé de traiter le chancre par la chaleur. Ils ont surtout proposé, comme Aubert et Lormand, des bains très chauds prolongés. Mais les résultats ont été insuffisants, et même non sans risques. Pendant un tel bain p. ex., il serait nécessaire de mettre des compresses froides sur la tête, de donner des cordiaux, etc., de crainte d'une syncope.</p> <p>C'est seulement par une autre méthode, celle d'Audry, publiée en l'année 1896, qu'on peut atteindre de bons et même d'excellents résultats. D'après cette méthode, on chauffe avec un thermocautère l'ulcération préalablement nettoyée à la curette. L'extrémité en platine, chauffée au rouge, est tenue pendant quinze secondes envi-</p>
--	--

<p>krustiĝon, kiu nur malhelpus la atingeblecon de la varmo al la subaj partoj. Pli bone laŭ bezono ripeti la operacion. Tiu ĉi metodo estas efektive kaj rapide mortiga al la bacilo de Ducrey. La meza kuraca tempo per la nura radiigo sen samtempa uzo de ia pulvoro estas laŭ MOLLER kaj MÜLLERN-ASPEGREN (Therapeutische Studien über ulcus molle en Festschrift gewidmet Moritz Kaposi 1900) 2-8 tagoj. Sed la metodo estas iom limigita. Por grandaj ŝiritaj ulceroj ĝi estas tre klopoda eĉ malprospera, kaj precipe por la ulceroj bubonaj la metodo de WELANDER multe superas.</p> <p>Sed ankaŭ al aliaj kuracaj celoj oni povas uzi la metodon de WELANDER. Diversaj bakterioj, kiuj incitas ulcerojn estas detruite influataj per la varmo. Tiel oni povas ekzemple kuraci <i>syphilides érosives</i>, paplojn mukmembranajn ege sekreciantajn (kiuj fariĝas puraj dum paro da tagoj), ulcerojn gumajn ktp. Ankaŭ <i>ulcus chronicum anti-</i></p>	<p>ron à 4 mm au dessus de l'ulcération. On doit éviter la formation d'une croûte qui ne ferait que gêner l'accès de la chaleur dans les parties sous-jacentes. Il vaut mieux, au besoin, répéter la petite opération. Cette méthode est effectivement et rapidement mortelle au bacille de Ducrey. Le temps moyen du traitement, rien que par la chaleur rayonnante, sans usage simultané d'aucune espèce de poudre, est suivant Moller et Müllern-Aspegren (Therapeutische Studien über ulcus molle dans Festschrift gewidmet Moritz Kaposi 1900) de 2 à 8 jours. Mais la méthode est un peu limitée. Pour de grandes ulcérations déchiquetées, elle est très difficile, impuissante même, et surtout pour les ulcérations buboniques la méthode de Welander est de beaucoup supérieure.</p> <p>Mais on peut encore employer la méthode de Welander pour d'autres buts thérapeutiques. Diverses bactéries qui déterminent des ulcérations, sont fatalement influencées par la chaleur. C'est ainsi qu'on peut par exemple traiter les syphilides érosives, les plaques muqueuses à sécrétion excessive (qui deviennent propres en un couple de jours), les ulcérations gommeuses, etc. De même</p>
---	--

<p><i>Cruris</i> povas tute puriĝi eĉ post unu tago.</p> <p>Multe pli signifa tamen estas la kuracado de <i>herpes tonsurans</i>, malsano ofte tre malfacile sanigebla per aliaj iloj. WELANDER priskribis siajn esplorojn pri tio en artikolo : <i>Einige Versuche, Herpes Tonsurans capillitii (trichophytie) mit Warme zu behandeln (Festschrift gewidmet Moritz Kaposi, 1900)</i> kaj poste havis kelkajn okazojn konstati la prosperan efikon de la metodo. La okazoj ne estis multaj, ĉar en Svedujo tiu malsano estas sufiĉe malofta, sed ili estis pruvecaj kaj tute konformaj al la teoriaj eksperimentoj.</p> <p>La kulturaĵaj provoj fariĝis per unu, kaj tutan tempon la sama, speco de <i>trichophyton megalosporon</i>. La <i>trichophyton microsporon</i> ne troviĝis en iu el la okazoj. Sed laŭ sciigoj ekz. de BALZER (<i>Semaine médicale</i>, la 20/12 1899) oni povas supozi, ke ankaŭ la specoj de tiu ĉi influigas per la varmo. BALZER priparolas okazon de <i>trichophyton microsporon Audouini</i>, sanigitan dum intervenanta febro tifoĵda. Certe estas, ke la <i>trichophyton microsporon</i> ne toleras tempera-</p>	<p><i>l'ulcus chronicum anticruris</i> peut se déterger entièrement même en une seule journée.</p> <p>Beaucoup plus significatif encore est le traitement de l'<i>herpes tonsurans</i>, affection souvent très difficilement guérissable par d'autres moyens. Welander a décrit ses recherches sur ce point dans un article : <i>Einige Versuche, Herpes Tonsurans capillitii (trichophytie) mit Warme zu behandeln (Festschrift gewidmet Moritz Kaposi 1900)</i> et eut, ensuite quelques occasions de constater l'heureuse efficacité de la méthode. Les cas n'ont pas été nombreux, car en Suède cette affection est assez rare, mais ils ont été concluants et tout-à-fait conformes aux expérimentations théoriques.</p> <p>Les essais de culture ont été faits sur une espèce, — et tout le temps sur la même, — de <i>trichophyton megalosporon</i>. Le <i>trichophyton microsporon</i> ne s'est trouvé dans aucun des cas. Mais d'après les renseignements de Balzer p. ex. (<i>Semaine Médicale</i>, le 20/12 1899) on peut supposer que ces espèces sont aussi influencées par la chaleur. Balzer parle d'un cas de <i>trichophyton microsporon Audouini</i> guéri pendant une fièvre typhoïde intercurrente. Il est certain</p>
--	--

<p>turon de 15° C. Forta kulturaĵo, metita en termostaton je 45° C. ne donas novajn koloniojn post 24 horoj. Ankaŭ temperaturoj malpli altaj, ĝis 41° C., malhelpas la kreskadon de la fungo, sed nur dum pli longa tempo, ĝis 8 tagoj.</p> <p>En la sama maniero sin montras, ke la kuracado per varmo nur je 41° C. donas nesufiĉajn rezultatojn, sed altigita ĝis 5° C., la varmo estas ege efika.</p> <p>Post raziĝo de la haroj oni metas sur la kapon kotonajn kompresojn trempitajn en akvon (aŭ pli bone en solvaĵon 5 % de kalciumbisulfito), poste la tubetojn kun la bandaĝo. La kuracado daŭras tri tagojn, kio plej ofte sufiĉas. Sed pli prudente estas refari tiun kuracadon unu aŭ du fojojn plu post tago de ripozo. Oni tiam vane provos igi kulturaĵon el haroj eltiritaj. Mikroskope oni do devas trovi la fungon en la haro, sed ĝi estas mortigita. Mi jus diris, ke pli bone estas uzi bisulfitan solvaĵon ol puran akvon. Eksperimentoj montras, ke tiu ankaŭ detruas la fungon,</p>	<p>que le trichophyton microsporon ne supporte pas une température de 45° C. Une forte culture mise dans une étuve à 45° ne donne pas de nouvelles colonies après 24 heures. De moins hautes températures, — jusqu'à 41° C. — empêchent aussi le développement du champignon, mais seulement après un plus long temps, jusqu'à 8 jours.</p> <p>De la même manière se démontre que le traitement par la chaleur seulement à 41°C. donne des résultats insuffisants, mais élevée jusqu'à 45°C. la chaleur est extrêmement efficace.</p> <p>Après rasement des cheveux on met sur la tête des compresses de coton trempées dans de l'eau (ou mieux dans une solution à 5 % de bisulfite de calcium), ensuite les petits tubes avec le bandage. Le traitement est continué trois jours, ce qui suffit le plus souvent. Mais il est plus sage de refaire ce traitement une ou deux fois encore après un jour de repos. On tentera vainement alors d'obtenir des cultures avec les cheveux arrachés. Au microscope on doit trouver le champignon dans le cheveu, mais il est mort. Je viens de dire qu'il est mieux d'employer une solution de bisulfite de</p>
--	---

<p>kaj ke la iloj helpas unu la alian.</p> <p>Oni povus supozi, ke ankaŭ <i>favus</i> estas kuracebla per varmo. ZINSSER priparolis en la jaro 1904-a kelkajn provojn koncerne tion. Estas do eble laŭ eksperimentoj faritaj en St-Goran per varmo plibonigi tiun malsanan staton, sed ne daŭri ĝin sanigi. Aŭ <i>Achorion Schænleinii</i> ne estas same influata per varmo kiel <i>trichophyton tonsurans</i>, aŭ tio dependas de la malsama kreskmaniero de la du fungoj.</p> <p>Estus tro amplekse nun paroli pri ĉiuj partoj de la medicino, kie la varmo estas uzebla por efika terapio. Aŭ parte mi preteriras la vastan regionon de la reŭmatismo, nur rimarkinte, ke en la malsanulejo St-Goran la metodo de WELANDER tre prospere uziĝas en kelkaj okazoj de artritoj gonoreaj. Pri tio oni krome havas sufiĉan sperton el la uzo de la aparatoj de TALLERMAN, BIER k. a.</p> <p>Finante mi nur volas tuŝi la kuracadon de alia gravamalsano, l'erizipelo. En la septembra numero, jaron 1904-an,</p>	<p>l'eau pure. Des expériences montrent qu'il détruit aussi le champignon et que les deux agents s'aident l'un l'autre.</p> <p>On pourrait supposer que le <i>favus</i> aussi est guérissable par la chaleur. Zinsser a décrit en 1901 quelques essais concernant ce point. Il est donc possible d'après les expériences faites à St-Goran d'améliorer par la chaleur cette affection, mais non d'arriver à la guérir. Ou bien l'<i>Achorion Schænleinii</i> n'est pas autant influencé par la chaleur que le <i>trichophyton tonsurans</i>, ou bien cela dépend d'un mode de développement différent des deux champignons.</p> <p>Il serait excessif de parler maintenant de toutes les parties de la médecine où la chaleur est utilisable pour une thérapeutique efficace. D'autre part, je passe sur le vaste terrain du rhumatisme, faisant seulement remarquer qu'à l'hôpital de St-Goran la méthode de Welander a été employée très heureusement dans quelques cas d'arthrite blennorrhagique. On a d'ailleurs là-dessus une expérience suffisante par l'usage des appareils de Tallerman, de Bier et d'autres.</p> <p>En terminant, je ne veux qu'effleurer le traitement d'une autre grave affection, l'érysipèle. Dans le numéro de septem-</p>
--	---

<p>de Internacia Sciencia Revuo, pĝ. 281-a, mi legis artikolon de D-ro VETJCLER : Nova kuraca metodo de l'erizipelo, kie li priskribas provon faritan en 63 okazoj kuraci per varmo radianta. La bonajn rezultatojn per lia metodo mi povis konfirmi en kelkaj okazoj, kie mi ĝin provis. Kaj mi estas certa, ke venonta sperto ne malkonfirmos la efikecon.</p> <p>Laŭ mia opinio ni ankoraŭ nur estas en la komenco de la uzebleco de la varmo por terapiaj celoj kiel koncerne aliajn fizikajn kuracilojn ĝenerale.</p>	<p>bre, année 1901, de <i>Internacia Sciencia Revuo</i>, p. 281, j'ai lu un article du Dr Vejtcler : Nouvelle méthode de traitement de l'érysipèle, où il décrit des essais de traitement par la chaleur rayonnante, ayant porté sur 63 cas. Les bons résultats de sa méthode, j'ai pu les confirmer dans quelques occasions où je l'ai essayée. Et je suis certain que l'expérience à venir n'en démentira pas l'efficacité.</p> <p>A mon avis, nous ne sommes qu'au début de l'emploi de la chaleur dans un but thérapeutique, comme en ce qui concerne d'autres agents physiques en général.</p> <p>Dr S. E. KRIKORTZ (Stockholm).</p>
--	---

La internacia kongreso pri fizioterapio, al kiu D-ro Krikortz prezentis tiun raporton, ne estas la sola medicina kongreso, kie la uzo de Esperanto estis permesata. En la kongreso de Lisbono (1905), ĝi estis en la nombro de la oficiale akceptitaj lingvoj, kun la angla, franca, germana kaj itala. La cirkulero de la organiza komitato de tiu kongreso sciigis ke la sekretario korespondis en Esperanto¹, kaj unu el la kolegoj

(1) Laŭ Dr J. Fels, el Lwów (Galicio-Aŭstrio), en **Voĉo de Kuracistoj**, aprilo 1908.

p. 56

de Pierre Corret en Barcelono, kiu proponis sin por pritrakti en sia disertacio la saman temon, informis ke D-ro Terricabres, el Vich, intencas prezenti komunikaĵon en Esperanto en la 16a Internacia Medicina Kongreso okazonta en Budapeŝto en 1909.

p. 57

Samjare okazos en Odeso la 11a ĝenerala rusa kongreso de Pirogov, kie la demando pri alpreno de Esperanto en la internaciaj medicinaj kongresoj estos metita en la tagordo konforme al deziresprimo de la medicina Societo de la Universitato de Kazan. Laŭ piednoto, la societo fondita memore al Pirogov estis la plej granda kaj grava el la rusaj medicinaj societoj. Al ĝiaj kongresoj, kiuj okazis ĉiun duan jaron, partoprenis multaj medicinistoj el ĉiuj partoj de la imperio. Laŭ dua piednoto, Pierre Corret ricevis de D-ro Kabanov tiun informon el “**Jurnalo de la rusa medicina Societo fondita memore al Pirogov**“ (8an de Decembro 1907).

La 16a kongreso de la Paco (Muniko, 1907) decidis ke Esperanto estos akceptata en la sekvanta kongreso; en Londono, en 1908, la Japana Pacista Societo delegis al tiu kongreso D-ron Kroita, profesoro en la Imperia Universitato de Tokio.

La Internacia Dentista Federacio, laŭ propono de D-ro Cunningham, el Kembriĝo, esprimis deziron por ke Esperanto estu akceptata kiel oficiala lingvo en la Internacia Dentista Kongreso okazonta en Berlino en 1909.

p. 58

La scienca panamerika kongreso okazonta en Santiago (Ĉilio) de la 25a de Decembro 1908 ĝis la 5a de Januaro 1909, enskribis Esperanton en sia tagordo laŭ iniciato de s-roj Valentin Letellier, rektoro de la Ĉilia Universitato [**Rimarko HM** : la ĝusta ortografio estas [Letelier](#)]; Edouard Poirier, plenrajta delegito de Gvatemalo en Ĉilio; Michel Cruchaga, ambasadoro de Ĉilio ĉe la Argentina Respubliko; kaj Edouard Fabres, profesoro pri Juro en la Ĉilia Universitato kaj prezidanto de la Esperantista Societo de Ĉilio. D-ro Fraga, el Santiago, skribis pri sia intenco prezenti en tiu kongreso raporton pri la neceso de internacia lingvo por la disvastigo de la scienco.

Esperanto tiam ĝuis je rekomendoj kaj subtenoj; ĝi jam estis plurfoje uzita en internaciaj kongresoj, same por la diskutoj en la kongresoj mem, kiel por la tiuokaze prezentitaj raportoj kaj komunikaĵoj.

Pierre Corret poste levas la demandon pri taŭgeco de Esperanto en la parola komunikado, t.e. ĉu ĝi estas same prononcata de diversaj popoloj por ebligi tujan interkompreniĝon. Li tuj klarigas ke ĝis la lastaj jaroj, oni provis demonstri per teoria argumentado ke estus tre facile por homoj inter si fremdaj interkompreniĝi per Esperanto. Oni tiam parolis pri ĝia fonetikeco. Kelkaj izolitaj spertoj montris la justecon de la teoriaj argumentoj : diversnaciaj personoj lernintaj Esperanton sen instruisto, per lernolibroj, renkontiĝis kaj povis tuj konversacii en tiu lingvo sen notinda diferenco de prononco. Corret aldonas piednote ke, en 1905, kadre de kunvenoj de la Esperantista Grupo de Parizo, ili diskutis dum kvaron-horo kun sveda esperantistino sen pensi ke ŝi ne estis franca; samaj spertoj jam okazis.

p. 60

Corret daŭrigas : “*La internaciaj esperantistaj kongresoj de Bulonjo ĉe Maro 1905, Ĝenevo 1906, Kembriĝo 1907 kaj Dresdeno 1908, rimarkinde konfirmis tiujn ĉi etajn apartajn spertojn. En ĉiu el ili, multaj kongresanoj apartenantaj al plej diversaj lingvoj kaj naciecoj, povis kun granda facileco konversacii, fari paroladojn kaj partopreni en diskutadoj en Esperanto pri plej diversaj temoj.*”

En la kongreso de Bulonjo ĉe Maro, okazis prezento de la teatraĵo "La edziĝo kontraŭvola", de [Molière](#) (*moljer*, FR), fare de tute kosmopolita trupo. Tiuj aktoroj provludis la teatraĵon nur unu aŭ du fojojn.

p. 61

Dum la unua kongreso okazis apartaj kunvenoj kunigantaj homojn laŭ profesio, fako, politika aŭ religia ideo, ktp. Inter tiuj kunvenoj, kun tiuj de dentistoj kaj farmaciistoj, menciindas tiuj de esperantistaj medicinistoj kiuj ĵus fondis ĝeneralan asocion de diverslandaj kolegoj.

En la tri unuaj kongresoj partoprenis laŭvice 800, 1000 kaj 1400 kongresanoj. La kvara, kiu okazis en Aŭgusto 1908 en Dresdno sub la alta protektado de la reĝo de Saksio, kaj kie estis reprezentitaj la registaroj de Usono kaj de Japanio, arigis ĉirkaŭ 1500 membrojn el 42 diversaj lingvoj kaj naciecoj. Paroladoj, raportoj, komunikaĵoj kaj diskutadoj, ĉio okazis en Esperanto; kaj la facileco de uzo de tiu idiomo inter homoj plejparte nekapablaj interkompreniĝi per vivantaj lingvoj, estas la plej bona praktika pruvo, kiun oni povas alporti pri la ebleco alpreni Esperanton en la internaciaj kongresoj.

p. 62

Neniam, fakte, internaciaj kongresoj tiel bone meritis sian nomon, per la nombro de partoprenantaj nacioj, ol la esperantistaj kongresoj; neniam oni povis tiel facile interkompreniĝi malgraŭ la lingvodiverseco de tiuj, kiuj partoprenis en ili.

La medicinaj verkoj kaj gazetoj

La internaciaj medicinaj rilatoj.

p. 63

Apud la internaciaj kongresoj, la medicinaj verkoj kaj gazetoj ludas la ĉefan rolon en la internacia disvastigo de medicinaj konoj.

Ĉiu medicinisto, kiu volas studi apartan demandon, estas kondukita serĉi tion, kio estis jam farita aŭ skribita eksterlande pri tiu demando, sed tuj staras antaŭ li, same kiel en la internaciaj kongresoj, la obstaklo de la diverseco de la lingvoj, kaj la fakto citita de D-ro Achard pri tiu nederlanda memuaro, por kiu li ricevis bonan tradukon nur post longa tempo kaj penado, estas nur unu ekzemplo pri tio, el miloj, pri la turmentoj al kiuj estas kondamnitaj ĉiuj, kiuj devas fari sciencajn esploradojn en la fremdaj verkoj kaj gazetoj.

Saman problemon havas studento pri medicino, ĝenerale ne poliglota, kiu volas redakti sian disertacion pri ordinara temo. Eble li petos tradukon, sed poste konstato ke la enhavo ne estis tiel interesa kaj uzebla kiel li supozis unuavide.

p.64

Corret citas kelkaj frazojn el la disertacio de Louis Fauvart-Bastoul, pri la internacia lingvo laŭ vidpunkto de la rajto de la homoj [**Rimarko H.M.** : prezentita en 1906, ĝi estis la unua en la mondo en rilato kun la lingva problemoj kaj Esperanto] : *“La sciencisto, li diras, kiu en sia lando laboras komforte ĉar li posedas la ŝlosilon de ĉiuj cerboj, kiuj samcele pensas, estas ofte haltigita kiam li bezonas scii pri konoj akiritaj aŭ malkovritaĵoj faritaj en aliaj nacioj. Kiom da perdita penado en serĉado, en laborado pri demando jam solvita sur alia loko de la Terglobo.*

Rimedo prezentiĝas antaŭ la spirito : lerni la fremdajn lingvojn pri kiuj oni povas havi bezonon. Sed ni tiam alvenas al tiu ĝena rezultato : se la sciencisto devas regi sufiĉe da lingvoj por informiĝi, ilia lernado estos forpreninta tiom da tempo, ke li ne povos atingi la nivelon al kiu lia persona laboro estus lin kondukinta. Li uzis plej bonan parton el sia tempo kaj fortoj, sian tutan junecon, por nur malperfekte posedi neeviteble nesufiĉan nombron da idiomoj.

Aliflanke, liaj fakultoj estas laŭ difino turnitaj al aparta mensostato kiu faras ke, laborante speciale en la branĉo elektita de li mem, li en ĝi distingiĝas. Tiu sciencisto, kiu havos specialan emon por scienco estos, pro tio, pli malpli nekapabla asimili vivantajn lingvojn.

Restas la ebleco pri traduko : en tio la rimedo estas ofte pli malbona ol la malbono, precipe por — p. 65 — specialaj verkoj : kiom da eraroj, kiom da kontraŭsenoj, kiom da sensencaĵoj estas en ili troveblaj ?

Krome, la cirklorezonado en kiu turnas la sciencistoj ebligis al unu el ili deklari ke la granda deziro de la scienca mondo estas rimedo de ĝenerala korespondado kiu dekobligus la rezulton de la streboj de ĉiuj, solidarigante ilin.“

Ofte esprimiĝis tiu ideo, i.a . fare de profesoroj, kiuj komunikis sian opinion al Pierre Corret pri la alprenado de internacia helplingvo en medicino, insistante pri la grandega tempoperdo rezultanta el la studado de fremdaj lingvoj, tio por alveni al neperfekta kono, dum la sama tempo estus pli fruktodone uzebla en personaj studado kaj esplorado.

Corret longe citas la opinion de profesoro Bergonié *“Kiom pli glate ĉio irus pri la specialaj revuoj se ĉiu aŭtoro povus fari resumon de sia memuaro en helplingvo, kiun publikigus la periodaĵo samtempe kun la origina memuaro. Referaĵoj memskribitaj legeblaj kaj kompreneblaj de ĉiuj, kia revo ! Tio estas tamen realigebla nur per la helplingvo !“*.

p. 66

La revo de prof. Bergonié efektiviĝis sur la tereno de medicino. Corret mencias, por ilustri tiun fakton, la 130-paĝan germanlingvan disertacion de Lambert (*lamber*) pri la teorio de

distordo de humero kun 16-paĝa resumo en Esperanto. Li aldonas ke por iu ajn ne scipovanta la germanan, estas sufiĉe facile kompreni Esperanto-resumon post mallonga studado de la principoj de la lingvo dum tiu, kiu havas kiel lingvan scipovon nur la konojn de la germana akiritaj dum la studjaroj, estas nekapabla kompreni la tekston de la verko, kvazaŭ li neniam estus lerninta tiun lingvon.

Por Corret, la disertacio de Lambert estas prototipo de la sciencaj verkoj de la estonteco. Kiam la aŭtoro mem aldonos al siaj verkoj esperantlingvan resumon, la tro fama itala esprimo "*traduttore, traditore*" (tradukisto, perfidulo) ĉesos esti vera, kaj la obstaklo de la lingvoj estos definitive malaperinta.

Kio estas necesa por tio ? Sufiĉas ke ĉiu, anstataŭ perdi valorajn jarojn al studado de pluraj fremdaj lingvoj, dediĉu al lernado de Esperanto nur kelkajn horojn se li volas nur legi ĝin, kelkajn semajnojn se li volas ĝin skribi, kaj kelkajn monatojn se li volas ĝin paroli.

p. 67

Corret opinias probable la fakton ke aŭtoroj kontentiĝos per aldono de internacilingva resumo al siaj verkoj; sed ne estas neeblaĵo en tio ke, por verkoj de ĝenerala intereso, ili aldonos kompletan tradukon aŭ eĉ ke ili redaktos ilin rekte kaj nure en Esperanto.

Corret mencias ankaŭ la kazon de la konata belga esploristo [Komandanto Charles Lemaire](#), kiu publikigis verkon pri centra Afriko, kaj en la franca sur la maldekstra paĝo, kaj en Esperanto sur la dekstra.

La uzado de Esperanto ne estos malpli utila por la revuoj kaj gazetoj de medicino ol por la medicinaj verkoj, kaj tio kio estis antaŭe skribita estas same aplikebla por gazetaj artikoloj : sufiĉos aldoni mallongan resumon en Esperanto por tuj ebligi aliron al ili al ĉiuj medicinistoj de la mondo. Tion intencas fari la rusa revuo "**Hirurgija**" kaj same la gazetoj, kiuj publikigas la oficialan bultenon de la Dentista Federacio laŭ deziro esprimita de tiu federacio.

Kiel sekretario de la Arkivoj de eksperimenta Medicino, D-ro Achard bedaŭras ofte ricevi de fremdaj aŭtoroj nekompreneblajn manuskriptojn.

p. 68

Same plendas ankaŭ D-ro Maillard, sekretario de la revuo de psikiatrio "**L'Encéphale**" (La Encefalo) pro la ĝeno, kiu rezultas el la lingvodiverseco en la bibliografia analizo de fremdaj verkoj.

Corret opinias ke la internacia lingvo liberigos la medicinajn gazetojn el ĉiuj tiuj malfacilaĵoj, sed la ĉefa utileco estas menciita de profesoro Broca : "*Ĝi ebligas la kreon de publikaĵoj en kiuj estos analizitaj kun sufiĉe detala klarigo ĉiuj originalaj memuaroj, kaj tiuj publikaĵoj, unu por ĉiu scienco, povos vivi, ĉar ili estos turnitaj al la tuta mondo*".

Corret mencias novan revuon "**Journal de Chirurgie**" (gazeto de kirurgio) kies unua numero aperinta en aprilo 1908 enhavis 85 analizojn de artikoloj aperintaj en la franca, angla, germana, itala, nederlanda, rusa kaj finna : Kiom pli facila estus la redaktado de tia revuo se ĉiun originalan artikolon aŭ memuaron sekvus Esperanto-resumo de ties aŭtoro mem ! Kiom pli utila estus ankaŭ tiu gazeto se ĝi mem estus redaktita en internacia lingvo kaj pro tio alirebla al ĉiuj medicinistoj de la mondo, anstataŭ turni sin al neeviteble fermita rondo de tiuj solaj, kiuj povas legi la francan !

p. 69

Apud tiuj analizoj povos aperi, kaze de bezono, kompletaj tradukoj de originalaj artikoloj kaj memuaroj, kies analizo estus nesufiĉa kaj, kiel rimarkigis prof. Lépine, pri kiuj oni povas havi bezonon legi la tutan tekston. Kreeblaj estos internaciaj medicinaj gazetoj, kies unika lingvo estos Esperanto, kaj kiuj estos aparte utilaj al la malgrandaj nacioj, kies lingvoj ne estas sufiĉe disvastigitaj por publikigi medicinajn verkojn en ilia nacia idiomo.

Corret citas "**The Lancet**" de la 11a de Julio 1908 :

“En Hungario kaj en najbareco de Hungario, oni parolas apartajn slavajn lingvojn (kroatan, bosnian, serban, rutenan, ĉeĥan, polan kaj slovakon) kiuj, kvankam ili havas komunan devenon, tiomgrade diferencas unuj de la aliaj, ke ruteno, ekzemple, ne komprenas kroaton, kiu havas mem malfacilaĵojn por interŝanĝi kun ĉeĥo. Oni povas diri sen troigo ke slovakoj (loĝanta en Alta Hungario) havas tiom da malfacilaĵoj por kompreni galicianon ol havus mem anglo. Tiu fakto damaĝas al la medicinistaro de ĉiu el la slavaj nacioj, kiuj estas unuope tro malgrandaj por unuope publikigi medicinajn kaj sciencajn verkojn. Ĉar la manko de tiaj gazetoj sentiĝis ĉefe inter la medicinistoj, tiuj ĉi unuiĝis por disvastigi Esperanton kiel komunan lingvon, kaj ni estas informitaj ke semajna medicina gazeto — p. 70 — en Esperanto aperos baldaŭ kaj estos aparte dediĉita al la slavaj demandoj.” (Citita el "The British Esperantist", Aŭgusto 1908.)

Medicinaj artikoloj aperis en Esperanto en diversaj gazetoj, kiel en Francio "Archives de Thérapeutique" kaj "Archives générales d'Hydrologie et de Climatologie", en Grekio en la revuo "Psichiatriki kaj Neurologiki Epitheorisis", sed plimulto estas trovebla, kompreneble, en la speciala esperantista gazetaro : estas nun fakte 66 esperantistaj gazetoj en la tuta mondo, el kiuj 13 dediĉitaj al diversaj specialecoj.

”Internacia Scienca Revuo”, scienca revuo fondita en 1904, entute redaktita en Esperanto kaj estrata de s-ro [René de Saussure](#), libera profesoro de la Universitato de Ĝenevo, publikigis da ili sufiĉe grandan nombron same kiel analizojn de diversaj medicinaj gazetoj: ”Wiener Klinische Rundschau”, — ”Archives Générales de Médecine”, — ”Gazette des Hôpitaux”, — ”Deutsche medizinische Wochenschrift”, — ”Semaine Médicale, Presse Médicale”, — ”Archives d'Electricité Médicale”, — ”Praktieskij Vrae”, — ”A Mediina Moderna”, — “Ĵurnalo de la Societo de rusaj Medicinistoj, fondita memore al Pirogov”, “Revista Medica de Chile”, — “Vjestnik občestvennoj gigieny, sudebnoj prakti-ĉeskoj mediciny”, — “Archives générales françaises de Thérapeutique physique”, — “Psichiatriki kaj Neurologiki Epitheorisis”. — “Medicinskoje Obosrenie” — p. 71 — “Journal de Neuropathologie et de Psychiâtrie nome de Prof. S. S. Korsakov”, — “Voprosi nervnopsiniĉeskoj mediciny”, ktp.

Speciale medicina revuo, “Internacia Revuo Medicina”, estis eĉ fondita en 1906. Ĝi donis, kun ilia traduko en Esperanto, la originalan tekston de la plej interesaj artikoloj aperintaj en la medicinaj gazetoj francaj, anglaj, germanaj, italaj, hispanaj, ktp. Bedaŭrinde, ĉar ĝi turnis sin al publiko tiam tro malgranda de esperantistaj medicinistoj aŭ poliglotoj, ĝi devis ĉesi aperi post kelkaj monatoj.

Pli modesta revuo anstataŭigis ĝin, unue kiel suplemento en Esperanto de la pola medicina gazeto “Glos Lekarzy” (La Voĉo de la Medicinistoj), kies nomon ĝi pruntis, kaj poste kiel aŭtonoma gazeto. Tiu ĉi ĵus estis alprenita kiel oficiala organo de Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio (T. E. K. A.), universala asocio de esperantistaj medicinistoj. Inter aliaj artikoloj ŝuldeblaj al ĝia internacia kunlaboro, tiu revuo publikigas nuntempe la rezultatojn de "enketo" farita inter ĝiaj legantoj pri la profesia medicina sekreto en la apartaj landoj kaj por kiu ĝi ricevis respondojn el ĉiuj partoj el la malnova kaj nova mondo. La tre interesaj rezultatoj de tiu enketo estis ĝis nun publikigitaj en diversaj medicinistaj gazetoj francaj, polaj, rusaj, hispanaj, ktp, impresitaj pro la intereso de tiu internacia konsultado farita per Esperanto.

p. 72

Tie trudiĝas demando: Por pritrakti medicinajn temojn, ĉu Esperanto posedas la necesajn terminojn ?

Oni vidis per la raporto prezentita fare de D-ro Krikortz en la unua internacia Kongreso de Fizioterapio, ke estas jam nun eble pritrakti en Esperanto teknikajn medicinajn temojn. La disertacio de Lambert havigas pri tio alian pruvon, kaj ni citos pri tio diversajn medicinajn broŝurojn aŭ monografiojn (plejparte tradukojn) ĝis nun publikigitaj en Esperanto:

"La tekniko de la termala kuracado en Aix-les-Bains", de D-ro Jean Dardel. — eld. Maloine.

"Kuracado de la mallakso kaj de ĝiaj komplikoj", de D-ro A. Y. Albert. — eld. Maloine.

"Raporto hidrologia kaj medicina pri la termala ŝlimbanejo de Saint-Amand-les-Eaux", de D-ro H. Thiroux. — eld. Maloine.

"Por niaj filoj, kiam ili estos dek-ok jaraj", de Professeur A. Fournier. — eld. Maloine.

"Higieno kaj Moralo", de D-ro Paul Good. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Parizo.

"Nova, estonte reganta Terapio de Diabeto", de Ludwig Bauer. — Koetzchenbroda-Dresde.

p. 73

kaj, malpli teknike :

"Inter Blinduloj", Esperanto-traduko de la verko de D-ro [Javal](#) (FR). — eld. Hachette.

"La aerkuracloko Weisser Hirsch". — eld. Emile Boden, Dresdo.

"Oraj reguloj por la vivado", de Bilz. — Dresdo-Radebeul kaj Lepsiko.

La multnombraj medicinaj artikoloj finfine aperintaj ĝis nun en "**Internacia Scienca Revuo**" kaj "**Internacia Medicina Revuo**", lasas nenian dubon pri la ebleco pritrakti en Esperanto la plej diversajn medicinajn temojn. Sekvas longega listo de titoloj, ekde la fino de la p. 73 ĝis 78 inkluzive :

Pri patogenio de ftizo kaj batalado kontraŭ tuberklozo. — Influo de la psika stato de l'gepatroj al formado de l'sekso de l' idoj. — Spina meningito akra traŭma. — Al demando pri parazitologio de sango dum epilepsio. — Unu kazo de miokimio. — Eksperimentaj esploroj pri la subkonjunktivaj injektoj. — Eozinofilio de la eksudatoj pleŭraj. — Utileco kaj limoj de ago kirurgia en kancero. — Nova serumo kontraŭtuberkloza. — Internacia organizado de scienculoj por esplorado de centra nerva sistemo. — Deka Internacia oftalmologia kongreso. — Japana imito de monstra bovidino kun homa kapo. — Efiko de vestoj sur kobajoj. — Efiko dinamogena aŭ inhiba de la masaĝo dolĉe farita laŭ la franca maniero. — La glataj muskolfibrooj. — Ekstera figuro de l'kranio : eksterkranio. — Esploroj pri la radioj N en la organismo. — Senkapsuligo de la reno kontraŭ medicinaj nefritoj. — Nova nutra kuracado kontraŭ albuminurio. — Apartigo de la urinoj. — Kuracado de la prostata hipertrofiio. — Radiografio de la urinaj ŝtonoj. — Podagro kaj kolĉicino. — Al la demando pri la patologia anatomio de pelagro. — Sistemaj spiritistaj deliroj. — Progresiva familia paralizo de alienatoj.

p. 74

— Injektoj de azotikacido kontraŭ abcesoj kaj bubonoj. — Pri la preparaĵoj formiacidaj. — Karakterizo de la ĉevala viando per precipita serumo. — La varmbanejo en Aix-les-Bains, kuracado, fiziologia efiko, kuraceblaj kaj nekuraceblaj malsanoj. — La nuanco de l' propra voĉo. — Nova manio. — Sveda higieno. — Disvolvo de l'aŭdo ĉe surdo-mutuloj. — Fizika kresko laŭ sociala stato. — Aĝo kaj alteco. — Reŭmatisma kuracilo. — Profunda fototerapio per hista impresebligo. — Serĉado de la retenado de la kloruroj. — Gimnastiko aŭ masaĝo en terapeŭtiko ? — Gastra kirurgio. — Sifiliso, progresiva paralizo kaj tabeso. — Lakta krioskopio. — Nova funkcio de la superrenaj korpoj. — La vido en lumo kaj mallumo. — Rezisteco de la ratoj kontraŭ l' arsenika venenado. — La nutra raziono de la laktinfanoj. — Influo de la mediteranea klimato al tuberklozo kaj tuberklozuloj. — Pri influo de laboro kaj vivo de fabrikaj laboristinoj al morteco de l'infanoj. — Influo de paga medicina praktiko por disvolvigo de la tuta medicina afero. — Higiena regularo por geedzoj. — Pezo de l' cerbo kaj inteligenteco. — Mortado de infanoj. — Masaĝo ĉe ostrompoj. — Pri entoksiĝoj per kamfora naftolo. — La dormistino en Thenelles, dormado seninterrompa dum dudek jaroj. — Influo de telefonado je la orelo. — Novaj esploroj pri la okulaj stigmatoj de l' krimeco. — La Pirogova kongreso de rusaj kuracistoj. — Elektroterapio. — Radiumo en pocio. — La vivisecio. — Blinduloj kiel masaĝistoj. — Propagado de la tifa febro per butero. — Ciklismo kaj stomakaj malsanoj. — Internacia ekspozicio de Higieno. — Pri la arteria hiperstreĉo. — Tekniko de la malvarma

banterapio en la tifa febro. — Venenado per malbona viando. — La elsekigado kaj la fototerapio por la kuracado de la burĝonemaj vundoj. — La nutrado de la suĉinfanoj. — Influo de intestaj bakterioj al nutrado. — La karpoj kaj la hepatadistomo. — Uzado de pomoj por kuracado. — Poŝta transsendo de kontaĝiaj malsanoj. — Nova teorio por klarigi kancerajn lezaĵojn. — Pri uzado de 1' adrenalino ĉe la neredukteblaj hemorojdoj. — Venenado per la bromoformo. — Higieno de la loĝejoj. Nepenetrebligado kaj purigo de 1' pargedoj. — « Kapoko » kaj ĝia uzebleco medicina. — Kion faris la okulkuracistoj por la higieno de la lernejoj kaj kion ili

p. 75

devas ankoraŭ fari. — Rolo de 1' kuracisto. — La « harakiri » en Japanujo. — La homa haŭto. Vegetalaro. Propraj defendiloj. — Novaj eksperimentoj pri revivigo de 1' koro. — La videbligado de la korsonoj. — Induktita radioaktiveco de korpoj ĉe la medicina uzado. — Venenado per kukoj. — Nova malsano. — Alkoholo en sango. — Nova procedo por revivigi senkonsciigintojn. — Maloftaj mortkaŭzoj. — Influo de la steriligo de la nutraĵoj. — Diagnoza kaj prognoza signifo de la malsanoj de 1' retino en la nefrito. — La spontanea generado. — Nova kuraca metodo de l'erizipelo. — Nova loka sendolorigilo : la stovaino. — Fiziologiaj proprecoj de la lumbanoj. — Citodiagnostiko. — Rolo de bakterioj saprofitaj kaj patogenaj. — Resuma instruo pri nutra higieno de unuaj infanoj aprobita de la « Pariza Medicina Akademio. » — Tuberklozo en Germanujo. — La lasta operacio de Waldek-Rousseau. — Praktika maniero de la dezinfektado de la paperoj. — Esploro pri la fumo de la cigaredo kaj de la pipo. — Akuta urinretenado de prostatuloj. — Malvarma kompreso toraka de la pulmaj afektoj akutaj. — Kuracado de 1' malbonodoraj piedvŝitoj per kalipermanganato. — Pulvoro de karbo kiel universala kontraŭveneno. — Etiologio de l'apendicito. — La interspaca glando en la testiko de 1' mamiferoj. — Dieto antaŭ kaj postoperacia de 1' histerektomio. — Pri la influo de radioj Röntgenaj je la organoj internaj. — Regularo en Buenos-Aires rilate al tuberklozo. — Kurcista praktikado en amerika okcidento. — Pleŭrita flanko dolor-punkto konfuzebla kun la apendicita punkto. — Pri la ŝajna morto kaj la antaŭtempaj enterigoj. — La pulma edemo dum la gravedeco. — La flava febro en Rio-de-Janeiro dum 1901. — La sifilisa nazkataro de novnaskitoj. — La diagnozo medicino-leĝa de l'homa sango. — Pri la patologia heredeco. — Loka efiko de 1' kontraŭdifteria sero. — Pri la kuracado metatrofia de l'epilepsio. — Pri la epidemia meningo-encefalito. — La sifilisa mikrobo. — La daŭro de 1' vacina imuneco. — La variolo kaj vaccinado en Supra-Ubangi. — Nutreca valoro de 1' sukeraĵoj. — La nevroptiaj kapkronoj. — Nova kuracado de la rabio. Kuracado de neŭritoj per subhaŭtaj injektoj de aero. — Radika kuracado de 1' prostata hipertrofia. — Antiseptiko fizika. — Higieno de la lernejoj lokoj. — La vivo

p. 76

ŝirmata kontraŭ la mikroboj en la naturo. — La teorio pri la imuneco. — Asepscado de la manoj kaj vita sekreciado. — Pri akcidento grava de la saĝdento (vangdento malfrua). — Ĥinaj anatomio, fiziologio kaj intestoscienco, sciigitaj perfiguraĵoj. — Pri la kuracado per varmo. (Komunikaĵo prezentita en Esperanto en la Unua Internacia Kongreso de Fozioterapio, Lieĝo, aŭgusto 1905). — Medicina kuracado kontraŭ difterio. — Uzado de la masago kontraŭ la vizaĝa akneo. — La tikoj. — La stovaino kiel sensentigilo. — Pri la ĥirurgia kuracado de 1' kronikaj koliitoj. — Daŭro de la ekscitaj procesusoj ĉe diversaj muskoloj. — La sukero laŭ medicina vidpunkto. — Kurioza kazo de hidrargo-venenigo (post plombaĵo de dento). — Kuracado de intestovermo « Tenio » per ekstraktoj el Filiko vira. — Pri haŭta agado de radioj X. — Higieno de 1' trinkado. — Morfinomanio. — Nova kulturejo por pneŭmokoko. — Komunikebleco de diabeto. — Kuracado de rompoj de kalkanosto. — Karbonoksido kaj tabaka fumo. — La heredeco de intelektaj ecoj kunlige kun fizikaj. — La formulo de la sparteino. — Musa tripanosomo. — La memmortigo kaj ĝiaj kaŭzoj. — Kantado kaj tuberklozo. — Sendanĝera aparato por uzado de la kloroformo. — Averta kuracado de la falsa krupo. — Rolo de heredeco en etiologio de kronikaj nefritoj, laŭ literaturaj donitaĵoj. — La metoda masaĝo en la kuracado de la neŭritoj kaj polineŭritoj. — Neŭrastenio. — Cassia Beareana, sanigilo kontraŭ

la febro hematóglobinuria. — Kuracado de neŭrastenio. — Nova kuraca metodo. — Pri la klostrofobio aŭ angoro pri la malgrandaj spacoj. — Sociala higieno. — Entraĥea enprucigo de kuraciloj tra la nazo. — La antaŭaĵoj de 1^o kancero. — Dieta kuracado de artra reŭmatismo. — Digitalo kaj skrofulaceoj. — Lastaj medicinaj progresoj : Sifiliso, Eksperimenta ateromo, Podagro. — Heredeco de tuberklozo. Neŭrastenia dentodoloro. — Englutigo de kotono por faciligi la elpeladon de englutitaj objektoj. — Kuracado de bronko-pneŭmonio ĉe infanoj per oksigenaj enspiroj. — Kuracilaro de la mallaksokaj de ĝiaj komplikoj. — Uzado de la masaĝo kontraŭ la vizaĝa akneo. — Kuracilaro de la ŝajna morto de la novnaskitoj. — Pri la kuracado de la metritoj. — La danĝeroj de la oksigeniga akvo. — Rilatoj inter la nazo kaj la generaj

p. 77

virinaj organoj. — Akvominala kuracilaro en la metrito malakuta. — La stovaino kiel sendolorigantaĵo. — Pri okazo de malakuta tetano. — La gala brusta angino. — Medika-mentoj en naskiĝa stato. — La kulto de Eskulapo en Vendeo. — Traktato medicina-ĥirurgia pri ginekologio. — Pri la efiko de la digitalo kunigita kun la kafeino. — Pri la kafeino kaj ĝia influo sur la elpeladon de urikacido. — Averta kuracado de la falsa krupo. — La heredeco de la akiritaj signoj. — Antitoksinoj en kreskaĵaj organismoj. — Pri la acidiĝo de la hepato kaj de la lieno konsiderata kiel certa signo de la morto. — Kuracado de la pigmentaj nevusoj per oksigen akvo. — Pri la skarlatinaj otitoj. — La obstetrikaj signoj de la degenerado. — La nervocidino. — La ĝeneralaj kondiĉoj de la deveno de degenerantaj familioj. — La sanigada stato de Rio-de-Janeiro en 1906. — Bibliografio : « **Les Criminels** », de D-ro Ledouble. — Novaj pruvoj de la heredeco de la akiritaj signoj. — Pri alkoholismo. — Profesiaj malsanoj. — Elektro kiel kuracilo. — Elektrofiziologio. — La stomakaj doloroj. — Frua aŭskultado de la batoj de la feta koro. Pri la periodeco de la malsanaj procesusoj dum la seksa vivado de la virino. — Haŭta abdomena reflekso dum la tifoĵda febro kaj apendicito ĉe la infano. — La vibra palpebrumado kaj la renaj afektoj. — La tuberkloza reŭmatismo tuberklozaj artralgioj. — La histeria febro. — La longedaŭraj paŭzoj de la tuberkloza meningito ĉe la infano. — Nemortiga eksteren rompiĝo de aorta aneŭrismo. — Pri la serĉado de la Kernig'a signo. — Kuracado de la sifiliso en kontinentaj landoj. — Kelkaj faktoj interesantaj por la dieta kuracado de diabeto. — La nutra dieto de epilepsuloj. — La liberaera kuracado de malsanoj ĉe infanoj. — Kuracado de la femurrompoj ĉe la suĉinfano. — Kuracado de la ulceroj per varmega sala solvverŝado. — Pri la kirurgia kuracado de la variĉoj per la metodo de Tredelenbourg-Remy. — Pri la kuracado de l'elartiko. — Eŭropa kinino. — Magnesia peroksido en terapio. — Malbonaĵoj de la mikrado de la laŭro-cerasa akvo kun la solvaĵoj por la subhaŭtaj enŝprucoj. — La kafeoj sen kafeino. — La tokseco de la kreso. — Karbonoksido kaj tabaka fumo. — La kuracado de l'arteriosklerozo. — Pri kelkaj punktoj de la efiko de la salaj laksiloj. Laksigo stomaka, intesta,

p. 78

hepata. — Revivigo per manipulado de la koro. — Artefarita spirigado. Metodo de D-ro Schafer. — Pri la seksa abstinenco. — Kuracado de la striknina venenado kaj de tetano per spina anestezio. — Mortiga akuta koreo. — Disurio puerpera; veziko puerpera. — La senhareco. — La pilorostomio. — Suturo de grajnetaj vundoj. — La mana repuŝado de la ŝnuro en la antaŭenfaloj... — La parma fromaĝo por nutrado de acetonurinaj diabetuloj. — Regula kuracado de la sifiliso. — Loka kuracado de la kronikaj uretritaj. — La lokaj aplikoj de koncentra fenikacido por kuracado de furunko kaj de tuberklozaj gomoj. — Joda tinkturo kloroforma. — La difterio en la homaj amasoj. — La nenatura okulo. — Venenigo perenspiro de fumaĵo el nitracido. — La blenoragia pleŭrito. — Alopecio area pro enkraniaj kugloj. — La peptika ulcero de l'ĵejuno post gastro-enterostomio.

Ĉiuj tiuj artikoloj, originalaj aŭ tradukitaj, estis skribitaj sen malfacilaĵoj fare de medicinistoj de plej diversaj naciecoj.

Corret poste pritraktas la mankon de ĝenerala vortaro de medicinaj teknikaj terminoj rezultanta el la ankoraŭ nesufiĉa nombron de la esperantistaj medicinistoj. Sed estas antaŭvideble ke tiu manko, ankaŭ por aliaj fakoj, estos forigita en ne fora estonteco. Li

mencias, ekzemplodone, aperintajn teknikajn terminarojn por filatelo, komerco, matematiko, marnavigado, muziko, fotografio, ktp.

p. 79

La Esperantista Medicina Grupo de Francio, fondita en 1904 kaj prezidata de prof. Bouchard, aperigis anatomian kvarlingvan vortaron (latina, franca, angla kaj Esperanto) surbaze de la nomenklature de Bazelo kaj haviganta ĉiujn anatomiajn terminojn. Temas pri "**Dictionnaire anatomique en quatre langues**", eld. Masson. La saman verkon eldonis Hachette, Parizo, sub la titolo "**Esperanto Anatomia Vortaro kvarlingva**".

La Esperanta Internacia Scienca Oficejo, fondita en Ĝenevo en oktobro 1906 sub patronado de ISAE kaj estrata de s-ro René de Saussure, prenis sur sin la taskon arigi ĉiujn laborojn por teknikaj vortaroj laŭ metodika plano dividanta la tuton de la homaj konoj en cent klasoj laŭ la ekzemplo de la Decimale Bibliografia Klasifiko de la Internacia Instituto de Bibliografio de Bruselo, en kiu medicino okupas la klason 61.

Corret esprimas la esperon ke post nelonga tempo la medicinistoj havos kompletajn teknikajn vortarojn sed klarigas ke tio ĝis tiam ne estis nepre necesa, por tiuj, kiuj volis pritrakti teknikajn medicinajn temojn en Esperanto, ĉar la uzataj vortoj estas plejparte jam internaciaj.

Li opinias ke la internacia lingvo faciligos la internaciajn medicinajn rilatojn. Li donas pri tio konkretajn ekzemplojn :

D-ro Maillard, sekretario de la revuo "**L'Encéphale**" (La Encefalo), kiu bezonis en 1904 informojn pri la frua demenco, tiam ne tre konata en Francio, skribis en Esperanto al D-ro Grünfeld, kuracisto de la psikiatra hospitalo de Kichinev (Rusio, nun Chişinău — [Kiŝinevo](#) —, ĉefurbo de Moldavio), kies nomon li trovis en "**Internacia Scienca Revuo**" kaj kiu ricevis pri tio kompletan raporton pri la rusa laboro kun ok diversnaciaj kolegoj kies nura komuna lingvo kun li estas Esperanto.

Ankaŭ s-ro [Rousseau](#) (ruso), apotekisto en Levallois-Perret (~*levalŭa-pere*, apud Parizo), kiu redaktas naŭlingvan farmakologian vortaron (EN, FR, DE, NL, ES, IT, RU, SE, EO).

D-ro Panel, direktoro de la Higiena Oficejo de Rouen, kiu ricevante oftajn informpetojn el eksterlando, kaj ne scipovanta ĉiujn eŭropajn lingvojn, respondas al tiuj demandoj en Esperanto aldonante kape de sia letero : "*Petu la tradukon al la Esperantista Grupo de via urbo*" kaj kiu tiele povas facile kontentigi siajn korespondantojn.

Prof. [Diakonov](#), de Moskvo, kiu, sekve de bezono de informo de pola kolego el Aŭstrio, pro ne scipovo de lia lingvo, skribis al li en Esperanto, aldonante "[Esperanto-ŝlosilon](#)" ("**Voĉo de Kuracistoj**", n° 10, 1908).

Kaj fine Pierre Corret aldonas ke li ricevis amason da informoj el plej diversaj landoj por prepari sian disertacion.

Se la internaciaj rilatoj kun medicinistoj estas treege ĝenataj aŭ eĉ malhelpataj pro la lingvodiverseco, tiuj inter kuracistoj kaj malsanuloj diversnaciaj estas ankoraŭ pli malfacilaj.

En "**Voĉo de Kuracistoj**", D-ro Mikolajski, el Lwów (Aŭstrio, nun en Ukrainio: Lviv — [Lvivo](#) —), atentigas pri la situacio de kuracistoj de termaj urboj (varmkuracejoj) kaj banlokoj por kiuj interkompreniĝo kun diverslandaj malsanuloj estas neebla. D-ro Corcellet, de [Alĝero](#), raportas en la sama revuo pri la malfacilaĵoj kiujn li ofte havis por interkompreniĝi kun siaj klientoj kiel kuracisto de Hammam-hira, kie multaj reŭmatuloj kaj podagruuloj, precipe germanaj, anglaj kaj usonaj, trapasas la vintron.

Corret ne dubas ke la tiam rapide progresanta uzado de Esperanto faciligos kaj plibonigos la rilatojn inter medicinistoj unuflanke, kaj inter kuracistoj kaj pacientoj aliflanke. Inĝenia usona specialisto, kiu kuracas "en tri tagoj" internacie konatan malsanon, aldonis Esperanton al la kvarlingva mencio de la lingvoj konataj de li : "*English spoken*", — "*Man spricht deutsch*", — "*Se habla español*", — "*Si parla italiano*".

LA RUĜA KRUCO

p. 84

Ekzistas cirkonstanco kiam ĉiu kuracisto povas esti alvokita por kuraci fremdulojn aŭ por rilati kun kuracistoj kies lingvon li ne scipovas, t.e. dum milito en servoj de la [Ruĝa Kruco](#).

La artikolo 1a de la nova Konvencio por la plibonigo de la sorto de la milit-vunditoj kaj malsanuloj en la armeoj en kampanjo, redaktita la 6an de julio 1906 en Ĝenevo, fakte indikas:

“La militistoj kaj la aliaj personoj oficiale alligitaj al la armeoj estos respektendaj kaj kuracendaj sen distingo de nacieco fare de la militanto kiu havos ilin sub sia regado.

Tamen la militanto devigata forlasi malsanulojn kaj vunditojn al sia kontraŭulo, lasos kun ili, tiom, kiom la militistaj cirkonstancoj ebligas tion, parton el sia personaro kaj sanitaran materialon por kontribui al ilia flegado.”

Krom la kazo al kiu aludas tiu artikolo, necesas ankaŭ antaŭvidi tiun de la aliancitaj armeoj en kiuj kuracistoj de — p. 85 — apartaj naciecoj devos kuraci vunditojn kaj malsanulojn, kies lingvon ili ne scipovas.

“Do, la eventualaĵoj venigos en la kampanjajn ambulancojn kaj hospitalojn lingvodiversecon, kiu konsistigas gravan venkendan malfacilaĵon por bone plenumi en ĉiuj cirkonstancoj la homhelpan taskon, por kiu sin devigas la Ruĝa Kruco.

Kioman faciliĝon en la rilatoj de servo oni sentus parolante nur unu lingvon komprenata se ne de ĉiuj, almenaŭ de la plejmulto.” (el **"Intercompréhension dans les Formations et Etablissements sanitaires en temps de guerre"** [Interkompreniĝo en la Organizaĵoj kaj Establejoj dum milita tempo] de generalo Priou, prezidanto de la Franca Societo Esperanto Ruĝa-Kruco).

Esperanto havigus netakseblajn servojn ankaŭ tie inter la kuracistoj de apartaj naciecoj same kiel inter ĉi lastaj kaj la kuracendaj vunditoj.

Delonge sentita estis tiu bezono. [Dunant](#), kies strebado kondukis al ellaboro de la [Ĝeneva Konvencio](#) kaj al la fondiĝo de la Ruĝa Kruco, diskonigis la lamentindajn konsekvencojn de la lingvodiverseco, kiuj manifestiĝas sur batalkampoj. Corret citas poste — p. 86-87 — kelkajn erojn el lia verko **"Un souvenir de Solferino"** (Memoro pri Solferino) :

“Oni imagu nun tiun operacion sur aŭstro scipovanta nek la italan nek la francan, kaj kiu lasas sin konduki kiel ŝafo buĉejen sen kapablo interŝanĝi unu parolon kun siaj helpemaj turmentistoj...

Resaniĝanta piemontano parolanta la francan kaj italo tradukanta demandojn de francaj soldatoj al lombardaj kuracisto j: oni konservas lin kiel interpretiston.”

Dunant vidis multspecajn suferojn fizikajn kaj moralajn, multajn kazojn en kiuj la neebleco kompreni kaj komprenigi sin treege akriĝis la maltrankviliĝon de la vunditoj kaj malsanuloj, multajn kazojn en kiuj le bezono de interpretisto estis preme sentebla : malsanuloj malkvietaj, maltrankvilaj pro suferego kaj febro, irititaj pro neebleco esti komprenitaj, timantaj amputon. *“Nur kelkaj klarigaj vortoj eldiritaj en lia gepatra lingvo sukcesas, meze de lamentinda intermiskompreno, kvietigi, trankviligi tiujn invalidojn de Solferino ...”*

Pli poste:

“Ĉu tiuj mortantoj, forlasitaj en la ambulancoj de Castiglione, en la hospitaloj de Breŝo, inter kiuj pluraj ne povis komprenigi sin en sia propra lingvo, estus farintaj la lastan spiron malbenante, blasfemante, se ili estus havintaj apud si helpemulon por aŭskulti ilin, por konsoli ilin ?...”

p. 87

La unuaj esploroj cele al faciligo de interkompreniĝo inter flegatoj kaj flegantoj, inter tiuj lastaj, kiam ili ne parolas la saman lingvon, estas ŝuldeblaj al italo, senatano Torelli, kiu publikigis en 1866 bonegan gvidlibreton : “**Dictionnaire pour l’infirmier volontaire des blessés en temps de guerre**“ (Vortaro por la volontula flegisto de la vunditoj en milita tempo).

Tiu libreto, redaktita en tri lingvoj (germana, franca kaj itala) aperis bedaŭrinde tro malfrue por servi dum la aŭstra-prusa milito de 1866. Ĝi tamen povis alporti servojn post la milito en la militaj kaj civilaj hospitaloj.

En 1870, la senatano Torelli publikigis, komence de la milito, francan-germanan eldonon de sia poŝvortaro kiu multe helpis.

“Pli ol 1600 ekzempleroj estis distribuitaj, kaj multaj malsanuloj estis treege dankemaj pro tiu utila interpretisto.

p. 88

La saman jaron, la Komitato de la Germana Societo de Vieno faris, por uzo en la germanaj militaj ambulancoj, libreton kiu tre similis al la verko de s-ro Torelli, sed pli taŭga ol tiu lasta.

(...)

Fine, en 1876 aperis la unuaj eldonoj de la rimarkindaj verkoj de s-ro Paul Blaschke, de Friedrichshagen (Berlino): “**Der internationale Lazaretsprachführer**“ (Laŭ generalo Priou, el jam citita verko)

“La bataloj, diras s-ro Blaschke, estas neeviteblaj, kaj la streboj devas celi la venkon ; sed humaneco postulas, favore al la vundito, senprokrastan sukuron kaj, pro tio ke li fariĝis sendanĝera, ke li ne estu senutile foroferita. Maloportunaĵo konstatebla en milito, kaj precipe en la tagoj de batalo en la ambulacoj, estas tiu de la neebleco interkompreniĝi. Pro neebleco interkompreniĝi ambaŭflanke, la flegado fariĝas pli malfacila, ofte en tiuj kazoj la suferoj daŭras pli longe ol necese, kaj multaj el la deziroj de la paciento, — ofte, bedaŭrinde, la lasta ! — restas neplenumitaj.“

La verkoj de s-ro Blaschke estas dulingvaj vortaroj germana-franca, franca-germana, germana-angla, germana-rusa, — p. 89 — germana-itala, germana-hispana, germana-nederlanda, ktp, enhavantaj ĉ. 5000 vortojn kun la plej ofte uzataj frazoj, kiuj rilatas al ili akompanataj de klarigoj pri la prononco.

Sed la aŭtoro de tiuj vortaroj agnoskas mankojn en ilia uzebleco : “*Sed, estas neeble determini antaŭe en kiuj lingvoj ili devos esti faritaj ; el tio sekvas ke la bezono estas tute kompreneble sentebla, en ĉiuj ŝtatoj, de rezervo de tiaj gvidlibroj redaktitaj en kiom eble plej multe da lingvoj. Jam en la komenco de la milito la tutpretaj ekzempleroj estas distribueblaj al la flegistoj dum alie la tempo perdita en la reviziado de la manuuskriptoj kaj presejaj laboroj ne ebligis disdoni ilin kiam la milito estus baldaŭ finiĝonta aŭ kiam la ĉefaj bataloj estus jam okazintaj. Do, la tute homeca celo de tiuj gvidiloj estus tiel maltrafita. Cetere, ĉar tiuj ekzempleroj estus abrupte disdonitaj al la flegistoj, kiuj ne povis prepariĝi antaŭe al tio, okazus ke multaj el ili flankenlasus la libron kvazaŭ instrumenton kies mekanismon oni ne komprenas. La freŝdata milito inter Rusio kaj Japanio cetere montris kiom gvidiloj en lingvoj malsimilaj al la nia povas trovi aplikaĵojn tiom praktikajn kiom variajn. Do, oni vidas pro tio ke la bezono de tiaj gvidiloj estas sentebla en lingvoj tiom multaj kiom eblas.“*

[**Rimarko H.M.** : Interretaj spuroj pri Paul Blaschke montras ke li verkis aŭ kompilis aliajn librojn kaj vortarojn : “**L’Interprète médical. Dolmetscher am Krankenbette**“ (La medicina interpretisto, 1907). “**Technologisches Wörterbuch**“ (Teknologia vortaro, 1893).

“**Wörterbuch der Elektrotechnik in drei Sprachen : Deutsch-Französisch-Englisch**“ / hrsg. von Paul Blaschke; mit einem Vorwort von F. Niethammer (Trilingva Vortaro de Elektrotekniko, kun antaŭparolo de F. Niethammer / “**Dictionnaire électrotechnique** :

français-allemand-anglais“ / “Electrical dictionary : english-german-french“. Leipzig : Hirzel, 1902].

p. 90

P. Corret aldonas klarigojn pri la malfacilaĵoj ligitaj al tia sistemo kaj memorigas la opinion de prof. Gariel pri la nombro de tradukoj necesaj por kvar lingvoj en internaciaj kongresoj (vd ĉe p. 19).

Corret komprenigas ke, tamen, ”*Ĉiu ŝtato devus antaŭe posedi grandan kvanton da ekzempleroj de ĉiu el la eldonoj de tiuj vortaroj devige kostaj kaj volumenaj en rilato kun sia nacia lingvo*“, kaj li citas generalon Sebert :

“*Krome, eĉ limigante ilin, kiel oni devis fari ĝis nun, al la ĉefaj uzataj lingvoj kaj precipe al la germana, kiu estis la sola alprenita kiel bazo fare de s-ro Paul Blaschke, oni ne povis ricevi de tiuj manlibroj kontentigan rezulton pro la gramatikaj komplikaĵoj kaj la malfacileco de prononcado, kiujn ili prezentas, malfacilaĵoj tiom pli seriozaj ke la loĝantoj de apartaj provincoj de sama lando ofte prononcas samajn vortojn laŭ maniero tre malsimila.*

Tiuj malfacilaĵoj malaperus se uzebla estus meza rimedo de komunikado inter ĉiuj homoj, kia ajn estas ilia origino, de dua lingvo komuna al ĉiuj, kiu estus facile lernebla kaj posedus absolutan uniformecon de prononcado, tiel haviganta al ĉiu la rimedon por traduki laŭ komprenebla maniero, ĉiujn kutimuzajn kaj utilajn frazojn.

Oni povus facile krei serion da manlibretoj uzeblaj fare de ĉiunaciaj vunditoj kaj malsanuloj — p. 91 — por ebligi al ili konversacii en tiu lingvo kun personoj flegontaj ilin.“ (Generalo Sebert, Membro de la Institut [Franca Akademio de sciencoj], membro de la konsultativa Komitato de la Unuiĝo de Virinoj de Francio : “Demando adresita al la delegitoj de la oka internacia konferenco de la Ruĝa Kruco, kunveninta en Londono en 1907”.)

Tiaj manlibroj, kiuj pezis 5 gramojn kaj kiuj kostis 5 centimojn de franko, estis jam publikigitaj fare de leŭtenanto Bayol (*bajol*), instruktoro ĉe la speciala militlernejo de Saint-Cyr, sub la ĝenerala titolo “**Guide Esperanto de la Croix-Rouge**“ (Esperanto-Gvidilo de la Ruĝa Kruco) kaj tradukita en diversaj lingvoj. Ili povos esti valoregaj helpiloj por la personaro de la Ruĝa Kruco vokita por flegi vunditojn, por la vunditoj mem sen scio pri la lingvo de tiuj, kiuj flegas ilin kaj por la kuracistoj de la sanitaraj organizaĵoj kaj establejoj en milita tempo. Estas cetere evidente ke se Esperanto estus ĝenerale konata de kuracistoj, tiuj ĉi povus ĝin uzi senpere kun siaj fremdaj kolegoj kaj kun la personaro de la Ruĝa Kruco, kiu estus ĝin lerninta dum paca tempo, la manlibro tiam estus necesa nur al tiuj, kiuj ne scipovus la internacian lingvon aŭ por la interrilato kun vunditoj en sama situacio.

La Medicina Direktoro de la Lernejo de la militista sanitara servo de Liono permesis, per ministeria cikulero de la 23a de marto 1907, organizi Esperanto-kurson en tiu lernejo, kaj, en Rumanio, — p. 92 — laŭ propono de profesoro Demosthen, ĝenerala inspektoro pri sano de la rumana armeo, la ministro de la milito permesis la enkondukon de Esperanto en la Lernejo de milita medicino de Bukareŝto. Esperanto-kurso estis tie malfermita la 8an de Marto 1908 kun 60 lernantoj kun ĉeesto de prof. Demosthen kaj de kolonelo Christodorescu, direktoro de la lernejo.

La ideo apliki Esperanton serve al la Ruĝa Kruco estis unufoje esprimita antaŭ ses jaroj en Kanado, en gazeto de Montrealo, “**La Lumo**”, redaktita en la franca, la angla kaj Esperanto ; poste fare de D-ro de Rop, prezidanto de la antverpena komitato de la Ruĝa Kruco.

Ĝin reprenis kaj disvolvis leŭtenanto Bayol, en broŝuro “**Esperanto et Croix-Rouge**” publikigita en 1906; kaj tiu ideo progresis inter la membroj de la Ruĝa Kruco kaj rapide disvastiĝis en la apartaj landoj ĉefe dank’ al la strebado de ĝia aŭtoro.

La Esperantista Kongreso de Ĝenevo (1906) unuanime akceptis la sekvantan deziresprimon, kiun publikigis la Internacia Bulteno de la Societoj de la Ruĝa Kruco de Oktobro 1906 :

“La Esperantistoj, kunvenintaj en Kongreso en Ĝenevo, konsiderante ke ĉiu malsanulo aŭ vundito de batalkampo, kia ajn estas ilia nacieco, rajtas je flegado de la ambulancoj, de la

kampanjaj hospitaloj kaj de ĉiu establiĝo sur kiu flirtas la flageto de la Ruĝa Kruco; ke ofte okazos, — p. 93 — por ne diri preskaŭ ĉiam, ke multaj lingvoj nekonataj de la plejmulto estos tie parolataj, dum komuna lingvo faciligus la rilatojn inter kuracistoj, flegistoj kaj malsanuloj ;

Esprimis la deziron ke la internacia helplingvo Esperanto estu konata, se ne de ĉiuj, almenaŭ de la plejmulto el la personoj alvokataj fari aŭ ricevi flegadon de la Societoj de la Ruĝa Kruco.

Por atingi tiun celon, estos necese :

1° Ke la anglaj esperantistoj uzu sian tutan influon apud la organiza Komitato de la venonta Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco por ke la demando pri la lingvo Esperanto estu enmetita en la programo de la pridiskutotaj demandoj dum unu el la seancoj ;

2° Ke unu aŭ pluraj esperantistoj de ĉiu nacio prezentu kaj subtenu, aŭ prezentigu aŭ subtenu tiun demandon al la Konferenco de Londono;

3° Ke la propagando estu plej aktiva en la societoj de sekurado al la vunditoj kaj ke la esperantistoj de ĉiu nacio, membroj de la Ruĝa Kruco, kuracistoj, kirurgoj, farmaciistoj, ĉiugradaj militistoj, laŭeble plej bone strebu por organizi prelegojn pri, kaj kursojn de, Esperanto."

En 1907, generalo Sebert, membro de la konsulta Komitato de la Virinoj de Francio, — p. 94 — adresis demandon al la Oka Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco por atentigi la delegitojn de tiu konferenco pri la utileco de Esperanto en la sanitaraj organizaĵoj kaj establiĝoj dum milita tempo. Poste fondiĝis "nacia komitato" konsistanta el esperantistoj apartenantaj al la tri societoj de la Ruĝa Kruco en Francio, el militistoj, maristoj, kuracistoj, kirurgoj "por la disvastigo de la internacia helplingvo Esperanto en la franca Ruĝa Kruco". Tiu komitato transformiĝis en "Franca Societo Esperanto-Ruĝa-Kruco"; anonciĝis la fondiĝo de analogaj societoj eksterlande.

La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco mem montris intereson pri la afero kaj delegis unu el siaj membroj, s-ro Ad. Moynier, al la freŝdata esperantista kongreso de Dreseno.

La raporto de tiu delegito, neesperantisto, kaj kiu ĉeestis en la kongreso nur kiel senpartia atestanto, aperis en la numero de Oktobro 1908, de la Internacia Bulteno de la Societoj de la Ruĝa Kruco.

Corret poste publikigas la raporton "*kiu montros la eblecon uzi Esperanton por eviti la ĝenaĵojn de la lingvodiverseco en la servoj de la Ruĝa Kruco dum milittempo*".

*

**

Resumo de la raporto de s-ro Ad. Moynier (p. 93-100):

Adolf Thalwitzer, germano, volis nepre testi Esperanton kaj demonstri ĝiajn praktikajn avantaĝojn sur la tereno, alimaniere ol per teorio. Generalo Schmidt disponigis al li sekcion de flegistoj de la saksa Ruĝa Kruco. "*En dek lecionoj, li sukcesis havigi al ili sufiĉan instruadon por ebligi al trideko da homoj, kiuj scipovis nur la germanan, plenumi ordojn en Esperanto, kaj respondi al la demandoj faritaj al ili en tiu lingvo.*" Rekomencita plurfoje kun sukceso, sen unu germanlingva vorto, la eksperimento okazis sub observado de diversaj eminentaj personoj, inter kiuj generalo Ruhlemann (Germanio), generalo Hyppolite Sebert (Francio), [majoro Paul F. Straub](#), oficiala delegito de Usono, militista kuracisto ligita al la ministerio de la milito, [D-ro Kroita](#) (Japanio) kaj D-ro Zamenhof. Notindas ankaŭ ke, okaze de tiu sama kongreso, policanoj de Dreseno ricevis Esperantoinstruadon. [Rimarko H.M. : tiu instruado ne restis senspura post la Unua Mondmilito, ĉar ekzistas fotografaĵo de 1921 sur kiu aperas 41 membroj de la Klubo de Esperantaj Policistoj de Dreseno. Vd ankaŭ en la "**Enciklopedio de Esperanto**" ĉe "[Polico](#)". Bedaŭrinde, la naziaj persekutoj kaj la detruo de la urbo, en 1945, neniigis ĉion.]

LA ĜENERALA PROBLEMO DE LA INTERNACIA LINGVO

p. 101

Estis ĝis nun agnoskate, en la tezo de Pierre Corret, ke la internacia lingvo devas esti neŭtrala idiomo artefarite kreita.

Kvankam profesoro Lépine agnoskis, ke Esperanto taŭgus por tiu rolo, li asertis ke la franca en tiu rolo havus avantaĝojn, tio, kompreneble, unue por la francoj... Ĝia alpreni liberigus la francojn je lernado de aliaj lingvoj kaj ĝi devigus la aliajn popolojn lerni la francan. "*La tempo kiun la fremduloj dediĉus al la lernado de nia lingvo estus de ni uzebla por utila scienca esplorado, kaj la oficiala agnosko de la franca en la rolo de internacia idiomo havigus al ni sur ĉiuj aliaj nacioj nekontesteblan superecon.*"

p. 102

Sed ĝuste tiuj avantaĝoj profite al la nacio kies lingvo estos elektita, ĉiam malhelpos apartajn popolojn interkonsenti pri la alpreni de la nacia idiomo de unu el ili.

La alpreni de unu el la nun vivantaj lingvoj, diras prof. Achard, estus sendube forpuŝita fare de la uzantoj de la plimulto el la aliaj. Ni havas pri tio pruvon, la firman kaj viglan proteston, kiujn aŭdigis la anglaj medicinistoj en la internacia kongreso de Moskvo kontraŭ la ekskludo de la angla el la nombro de la oficialaj lingvoj de la kongreso.

Ĉu oni objektos ke la franca estas tamen bone akceptita kiel lingvo de la diplomatio ?

Oni ĝenerale nescias kio estas neekzakta en tiu ofte ripetata aserto. "*Ne estas ekzakte diri ke la franca estas ankoraŭ la lingvo de la diplomatio*", skribas s-ro Th. Cart, profesoro ĉe la Libera Lernejo de politikaj sciencoj, en raporto adresita al la ministro de la Publika Instruado pri la demando de la internacia lingvo. "*La rivalaj lingvoj havas nun lokon apud ĝi, ĝis kiam, pro la supera kreskado de loĝantaroj, kiuj ilin parolas, ili preskaŭ komplete flankenpuŝos ĝin. Antaŭ cent jaroj, ĉiu fremda diplomato devis scii la francan; neniuj el la niaj bezonis scii fremdan lingvon. Nun, kiom da ŝtatestoj, ekster Francio, ne scipovas nian lingvon ? — p. 103 — kaj kiu aŭdacos forigi la vivantajn lingvojn el la konkurso de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj ?*" (el "**Rapport sur la Langue Internationale**" [Raporto pri la Internacia Lingvo] adresita al la ministro de Publika Instruado fare de prof. Cart).

Neniam, cetere, la franca estis alprenita kiel oficiala lingvo inter la ŝtatoj, nek kaŭze de internacia konvencio, nek per nepra uzado. "*Tute male, en pluraj traktatoj redaktitaj en la franca, la kontraktantaj ŝtatoj faris formalajn rezervojn kaj enmetis apartan artikolon por deklari ke la uzo de tiu idiomo estus senkonsekvenca.*" Cifero resendas de tie al jena piednoto :

Tio okazis en la traktato de Rastadt de 1714, de Akeno de 1748, en la traktato de alianco inter Francio kaj Aŭstrio de 1756, en la fina Akto de la Kongreso de Vieno en 1815. La artikolo 120 de tiu akto estas tiel skribita : "*Ĉar la franca lingvo estis uzita en ĉiuj kopioj de la nuna traktato, estas agnoskate de la potencaj landoj, kiuj kune ellaboris tiun traktaton, ke la uzo de tiu lingvo ne havos konsekvencojn por la estonteco; tiel ke ĉiu nacio rezervas al si alpreni, en la estontaj intertraktadoj kaj konvencioj, la lingvon, kiun ĝi uzis ĝis nun en la diplomaciaj rilatoj, sen ke tiu nuna traktato povu esti citata kiel ekzemplo kontraŭa al la kutima uzo*".

Kaŭze de la principo de egaleco de la ŝtatoj, ĉiu suverena, ĉiu registaro rajtas uzi ekskluzive kaj demandi ke oni uzu iun ajn difinitan lingvon, tiu de iu lando aŭ tiu de fremda ŝtato, en la rilatoj, ĉu skribitaj, ĉu parolaj, kun la aliaj nacioj.

p. 104

Ni memorigu tiuokaze tiun ne tre konatan fakton : Foreign Office [Ministerio de Eksterlandaj aferoj de Britio] de Londono forlasis la uzadon de la franca kaj uzas nur la anglan en siaj raportoj kun pluraj potencaj landoj. Tiuj lastaj, fronte al la brita trosenĝeneco, respondis en sia propra lingvo. Tiel, ekzemple, la itala ambasado en Londono, jam de 1882, uzas ekskluzive la italan en siaj rilatoj kun Foreign Office.

La otomana Imperio korespondas turklingve kun la eŭropaj kortegoj; iam ĝi eĉ konsideris kiel devigaj por ĝi nur la traktatojn turke-arablingve redaktitajn.

Dank' al la helpo, kiun havigas al ĝi Usono, la angla estas anstataŭigonta la francan en la diplomaciaj rilatoj de Ekstrem-Oriento. La lasta traktato de komerco konsentita inter Meksikio kaj Ĉinio estas redaktita en la angla, kaj tamen Meksikio estas inter la landoj la plej fidelaj al la kulto de nia patrio“ (eltiraĵo de Pierre Corret el la disertacio de Louis Fauvart-Bastoul : "**D'une langue auxiliaire internationale au point de vue du Droit des Gens**").

En realeco, la diplomaciaj konferencoj ne pli bone solvis la problemon de la lingvodiverseco ol tion faris ĝis nun la internaciaj kongresoj. Oni juĝu pri tio en depeŝo adresita fare de sia korespondanto de Portsmouth al granda pariza ĵurnalo pri la rusa-japana konferenco de 1905 :

“La diskutado estas malfacile sekvebla, ĉar oni ofte parolas kvar lingvojn : la rusan, la francan, — p. 105 — la anglan kaj la japanan, s-ro Witte uzanta jen la rusan, je la francan, kiujn s-ro Nabokoff tradukas anglan, kaj kiun la japana sekretario tradukas japanan al s-ro Komura. Tiu lasta respondas en la japana, kiun la sekretario tradukas francan. Ĉar la japana tradukisto malbone konas la francan, okazas ke li tradukas nekorekte kaj ke s-roj Witte kaj Komura diskutas pri punktoj, kiuj ne estas de ili metitaj unuarange. Oni baldaŭ malkovras la eraron kaj oni komencas novan diskutadon.“ (“**Le Matin**“, 19an de aŭgusto 1905)

On vidas tion, la argumento de la franca internacie akceptata kiel lingvo de la diplomatio ne havas la valoron, kiun oni atribuas al ĝi, kaj ne estus uzebla por demonstri la eblecon de internacia interkonsento por la elekto de unu el la nun vivantaj lingvoj.

“Ni povus deziri, kiel tio iam okazis, konkludas Profesoro Gariel, ke la rolo de internacia lingvo estu atribuita al la franca. Sed pri tio ne estu iluzioj : la nuna interpopola rivaleco ne ebligas ke povu esti tiel. Ni akceptu la situacion kaj, ĉar tiu solvo ne estas esperebla, ni aniĝu al tiu, kiun Esperanto prezentas al ni.“

Esperanto estas ja la sola ebla solvo de la problemo, kaj ne pli taŭgus la elekto de morta lingvo.

p. 106

Sen paroli, kiel oni faris, pri la sanskrita, la hebrea, nek la greka, la latina, pli proksimaj al ni, kaj kiuj, kiel rimarkigis D-ro Achard, malpli kaj malpli taŭgas al disvolviĝo de teknika lingvaĵo. Ĉu oni imagas, ekzemple, la priskribon farita en la klasika latina pri la radiografia tekniko aŭ tiun de la produktado kaj aplikado de la altfrekvencaj kurentoj ?

Por povi uzi la latinan, necesus ĝin plijunigi kaj kompletigi, kio, entute, revenigus al la kreo de artefarita lingvo, kiu restante malfacila, ne havus la avantaĝojn de Esperanto.

Sed neforgesendas, ke se la tiel « kuireje farita » latina — oni pardonu al ni tiun esprimon — povus, se nepre necese, esti uzebla de sciencistoj en iliaj rilatoj kun kolegoj aŭ en la internacia kongresoj, la scienculoj studintaj la latinan aŭ kapablaj ĝin lerni ne estas la solaj, kiuj sentas la bezonon de internacia lingvo kaj la bezonon kongresi. La problemo de la internacia lingvo, en tio kio koncernas ilin, ne estas efektive aparta kazo de la ĝenerala problemo de la internacia lingvo, kaj se tiu lasta enhavas simplan kaj facilan solvon kiel Esperanto, estas dubinde ke apud la ĉiuspecaj kongresoj uzantaj tiun lingvon, plue okazus sciencaj kongresoj en la latina, eĉ modernigita.

p. 107

Corret reprenas prezenton, kiun faris prof. Cart en “**À la recherche d'une langue internationale**“ (Al serĉado de internacia lingvo) pri la ĝenerala problemo de internacia lingvo :

1. — La serĉata lingvo ne povas esti universala lingvo, sed nur internacia lingvo — kaj se tiu lingvo estas necesa.

Filozofoj kaj sciencistoj, kiel [Bacon](#), [Pascal](#), [Leibniz](#), Condillac ([FR](#)), [Diderot](#), [Ampère](#) pritraktis la ideon de universala lingvo, sed se oni konsideras ke universala lingvo celas anstataŭigi la nunajn lingvojn, tiu ĉi ideo estas nealloga. Pli modesta, kvankam vasta, estas la projekto de internacia helplingvo — **p. 108** — kiu celus ne ĉiujn homojn sed meze aŭ supere

kulturitajn homojn, komercistojn, industriistojn, kies aferoj aŭ laboro havas nete homecan aŭ internacian karakteron. Ne necesas mencii la multegajn avantaĝojn, sed kiom ajn grandaj ili estas, nur la bezono, ne la utileco, kreas la organon. Do, se la neceso de internacia lingvo ne estas sentebla, ĝi ne ekzistos, malgraŭ la inĝenieco de la esploristoj kaj la entuziasma kaj vana ardo de la apostoloj.

Ekzamenenda estas poste la demando ĉu la elekto de internacia lingvo altrudos sin post nelonga tempo al la moderna civilizacio, kaj, kaze de pozitiva respondo, ĉu tiu lingvo estos morta lingvo revivigita, unu el niaj vivantaj lingvoj aŭ artefarita lingvo.

2. - Ke la intelektaj, sciencaj kaj komercaj rilatoj devigu en mallonga tempo al elekto de tia lingvo.

Por klera franclingva homo, antaŭ malpli ol 50 jaroj, sufiĉis la scipovo de unu sola lingvo — **p. 109** — alia ol sia propra.

Jam de dudeko da jaroj, urĝas scii almenaŭ du. Morgaŭ, kun la kresko de la rimedoj de komunikado kaj la pligrandiĝanta intenseco de la eŭropa vivo, necesos lerni kvar aŭ kvin lingvojn : al la germana kaj la angla aldoniĝos baldaŭ la hispana, aŭ la portugala, la itala kaj la rusa.

En literaturo, se estas tute vere ke oni plene aprezas belan verkon nur en ĝia origina lingvo — kvankam estas ankoraŭ en tiu aserto, ĉe multaj homoj, pli da snobeco ol da sincereco — kiom da strebado estas necesa por akiri je sufiĉa nivelo nur unu aŭ du fremdajn lingvojn ? Kiel estos por la plejmulto ? Kaj, fakte, inter tiuj, kiuj trafe parolas pri la lingvo de Ibsen kaj de Tolstoj, kiom scipovas la norvegan kaj la rusan ? Oni devige alvenas al uzo de tradukoj en la gepatra lingvo aŭ en ĉiu alia konata lingvo, kaj tiel estos ĉiam pli.

Por la sciencistoj : matematikistoj, ekonomikistoj, medicinistoj, naturalistoj, filozofoj, kiuj skribas ne nur en du aŭ tri superregantaj lingvoj, la kondiĉoj estas ankoraŭ pli ĝenaj : multe da memuaroj, ekzemple svedaj aŭ rusaj, restas nekonataj, aŭ konataj nur per nesufiĉaj analizoj. Kaj en la universalaj kongresoj, kia kompatinda konfuzo ! Tie estas ekonomikisto, kiu tiel mallerte esprimiĝas en lingvo, kiu ne estas lia propra, ke ĝia tuta valoro ne estigas atenton, malgraŭ mensoge ĝentilaj komplimentoj, kaj tio ne malebligas ke li estas ridinda; aliloke, germana medicinisto tradukas francan anglalingvan paroladon — **p. 110** — de norvega kolego ! Suferas la gusto, ankoraŭ pli la scienca ekzaktecio.

La komercistoj ne estas malpli kompatindaj ol la beletristoj : nescipovo de certaj fremdaj lingvoj estas ilia senĉesa ĝeno; ili scipovas du aŭ tri, ili ne povas scipovi ĉiujn ; cetere, estas malavantaĝo senfine obligi la nombron de la oficistoj prizorgantaj la korespondadon, kaj se la germanoj, pro ilia rimarkinda diligenteco je studado havigas al la tuta mondo poliglotajn komizojn, ili ne ĉiam sufiĉos.

Oni povas prave diri ke oni ne povos solvi la ĉiam kreskantajn malfacilaĵojn, kiuj rezultas el la diverseco de la lingvoj de la civilizitaj popoloj, per lernado de tiuj lingvoj mem; ili estas tro multaj kaj tro malfacilaj, senĉese trudiĝas novaj, kaj, fine, necesas tion sincere agnoski, ili estas nur iloj, kies akiro devigas al forofero de tro da pli fruktodonaj studoj. Oni demandu pri tio al la finnoj !

Nu, se tiu solvo per lernado de pluraj lingvoj estas nebona, ĉar necesas trovi iun en situacio kiu fariĝas neakceptebla, trudiĝas la elekto de internacia lingvo, speco de komuna mono, — apud la mono de la lando — al la homoj, kiuj havas inter si komercajn, sciencajn aŭ intelektajn rilatojn.

p. 111

3. — Estas motivo por ekzameni ĉu tiu lingvo povas esti 1° revivigita morta lingvo; aŭ 2° vivanta lingvo, eĉ en duopo kun alia vivanta lingvo, aŭ 3° artefarita lingvo — necesas flankenmeti la du unuajn solvojn.

1° Ĉu tiu lingvo estos malnova lingvo ? La latina, ekzemple, ĉar neniu pensos pri la greka ? Ne, ĉiukaze, la latina, kiun ni lernis en kolegio; tiu ĉi latina (kies prononco cetere malsimilas en ĉiu lando) havas ja certe malfacilan gramatikon, se ne vortrezoron. Oni cetere uzis ĝin pli malpli bone en Mezepoko ĝis la modernaj tempoj, kiam ĝi praktike mortis, ne tiom pro malriĉeco, sendube pro tio, ke ĝi postulas tro da inteligenteco aŭ da spirito por kiu volas ĝin kompreni kaj per ĝi diri ĉion. Nu, ĉu simpligita latina ? farita per solecismo, barbarismoj, neologismoj, monstro kiu, sen reala kompenso, mortigus la klasikan latinon, je bedaŭro de tiuj kiuj ankoraŭ ŝatas ĝin kaj je granda damaĝo al la eŭropa kulturo ? Se oni rekomendis tiun solvon, oni ne retenos ĝin, laŭ komuna interkonsento inter partizanoj kaj kontraŭuloj de la lingvo de Cicerono.

2° Ĉu estos, kiel proponite kun la eminenta apogo de s-ro [Bréal](#), vivanta lingvo : la angla ? ne sola, en vero, sed en duopo kun la franca, tiel ke la franclingvaj popoloj lernus la anglan, dum la anglaj devontigus sin lerni la francan.

p. 112

Sed se oni povas kredi ke la registaroj franca, svisa, belga preskribos lernadon de la angla en ĉiuj siaj duagrada lernejoj kaj ke dum la italoj, germanoj, rusoj kaj aliaj trudos, kun elektoebleco, la anglan aŭ la francan, neniu, kiu konas Anglion kaj Usonon, pensos, mi imagas, ke oni povus iam enkonduki lernadon ekskluzivan kaj devigan de la franca en la lernejoj de tiuj landoj, plejmulte liberaj [privataj] lernejoj. Kaj kial cetere la angloj lernus la francan ? Por ĝin paroli kun la germanoj ? ĉar kun la francoj tio ne valoras: ili scipovus la anglan. Do la konvencio fariĝus baldaŭe kaj neeviteble unuflanka laŭ la leĝo de la plej granda nombro.

Solvo estus tamen la angla solvo, — cetere tute relativa, ĉar oni ne vidas kiel ruso parolanta la francan kaj svedo parolanta la germanan sukcesus interkompreniĝi, — sed ekster la angloj, kiu volos ĝin ? Kaj oni vere ne povus mallaŭdi la naciojn, kiuj defendas kun ĵaluza prudenteco siajn respektivajn poziciojn rilate al raso al kiu, sur ĉiuj terenoj, oni donus ekscesan kaj preman hegemoniecon per alpreno de ĝia lingvo kiel internacia lingvo. Tiu rezonado validas kontraŭ ĉiu lingvo, kiu estus tiu de granda popolo — ĉar ĉiu alia estas kompreneble ekskludita el la konkurso — la solvo per elekto de moderna lingvo troviĝas tiel memkompreneble eksigita, kaj ne plu restas alia ol la starigo de artefarita lingvo.

p. 113

4. — Pri la elekto de artefarita lingvo kaj la kondiĉoj kiujn ĝi devos plenumi — ke nur « Esperanto » plenumas tiujn kondiĉojn, kaj entute plenumas ĉiujn, kaj kiel ĝi triumfos.

Kia ajn ĝi estos, tiu lingvo, devos kontentigi la ĉi sekvajn postulojn : esti por ĉiuj kleraj homoj facile prononcebla, havi tre simplan gramatikon, posedi vortrezoron kies asimilado estu facila al la germanoj same kiel al la slavo aŭ al la parolantoj de latindevenaj lingvoj. Ĝi devas esti lingvo kompleta, t.e. kapabla esprimi ĉiujn ideojn kun precizeco, kaj tia ke oni povu ĝin skribi, legi kaj paroli, ĉar, krom tio ke lingvo kiun oni ne povus paroli ne sufiĉus, la memoro ne povus ĝin reteni, pruvas tion Volapuko, kun ĝena malfameco, aŭ la pli freŝdata ne pli saĝa « langue Bleue » [Blua lingvo].

Se tiu lingvo ne ekzistus, necesus ĉi tie ĉesigi vanan serĉadon. Ĉar pravi la teorion eblecon ne antaŭenigas. Sed ĝi ekzistas. Tio ne estas verdire artefarita lingvo : neniu lingvaĵo estas tia, escepte, eble, tiu de la surd-mutuloj. Ĝi ne estas ankaŭ plene natura : ankaŭ plene natura ne ekzistas. Natura estas nur tiu de la sovaĝulo, kaj tamen, kiu ne plu komprenas sian avon kaj ne estas komprenata de sia edzino forrabita en najbara tribo. Kiel ĉiu lingvo, ĝi estas konvencia; sed, dum la aliaj estas tiaj inter sampatrianoj kaj tiom pli ke — p. 114 — la civilizacio antaŭeniris, tiu ĉi estas tute tia, kaj internacie. La diferenco rilatas al la medio kaj grado, ne al la natur-ecaro [esenco].

La sonoj de tiu lingvo, harmonia kiel sudfrancia idiomo, estas fremdaj nek al iu ajn orelo nek al iu ajn buŝo eŭropa; ĝia gramatiko, absolute regula — la samaj finaĵoj havas ĉiam saman signifon — estas tiel simpla, tiel logika, ke oni lernas ĝin en malpli ol unu horo; la vortrezoro konsistas el konsiderinda fonto komuna al la ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj pri kiu neniu meze

instruita homo estas sen scio. Oni sukcesas ĝin legi kun certeco en kelkaj tagoj, ĝin skribi en kelkaj semajnoj, ĝin paroli en kelkaj monatoj.

Ĝi havas literaturon, estas agnoskinde ke ĝi konsistas ĉefe el tradukoj; sed kiu alia pruvus pli bone ol ĝi la flekseblecon kaj kapablon ĉion diri ? La versio de Hamlet, fare de D-ro Zamenhof, la inĝenia rusa aŭtoro de tiu rimarkinda lingvo, estas en multaj aspektoj mirindaĵo de ekzakteco kaj allogeco; en sia tuteco, ĝi samvaloras kun germana aŭ franca traduko, se ĝi ne estas supera.

Tiu lingvo nomiĝas Esperanto. Ĝi estas nun parolata fare de kelkaj miloj da homoj de diversaj naciecoj : rusoj, svedoj, hungaroj, kanadanoj, francoj. Oni jam instruas ĝin en preskaŭ cent urboj

Piednoto : Taksado farita en 1902. Estas nun 858 esperantistaj societoj en Eŭropo, 174 en Ameriko, 19 en Oceanio, kaj 116 profesiaj kaj diversaj specialaj).

p. 115

Iom post iom ĝi disvastiĝos, pri tio ne dubu, sed ne senlukte. Komence ĝi havos kontraŭ si, sufiĉe kompreneble, tiujn, kiuj eltiras el la instruado de la modernaj lingvoj tre rajtajn kaj honorindajn enspezojn. Ili malpravus: la lernado de internacia lingvo malhelpos nur bedaŭrindan disigon de tempo kaj streboj tute sen malutili al la serioza lernado, kiu restos por multaj necesega, de unu aŭ du fremdaj lingvoj; ĉiuj tradukoj en Esperanto kondukos al tio, ke oni neniam plu povu studi la literaturon aŭ la socion anglan sen kono de la angla, aŭ juĝi Bismarck kaj lian verkon sen scipovi la germanan.

Cetere, ĝi eble renkontos malmulte da simpatio apud spiritoj tre eminentaj, tre subtilaj, al kiu tia lingvo ŝajnos esti tute sen arto kaj animo. Sed la arto kaj la animo, tio estas ni kiuj metas ilin en niajn lingvojn, kies vivo estas tiu, kiun ni havigas al ili. Tiu lingvo havos la animon, kiun ni havigos al ĝi, tre homecan, tre modernan, ne sen allogeco, certe.

Tiel, dum la rezistado estos ne multe perforta, ĉar neniu grava intereso estos minacita pro la alpreno de konvencia lingvo, la propagando fariĝos ĉiam pli aktiva ĉiudirekten; multaj kursoj estos starigitaj en ĉiuj landoj; sciencistoj jam anoncas la publikigon de memuaroj en la internacia lingvo; komercaj entreprenoj, siaflanke, sciigas ke ili akceptas leterojn en Esperanto kaj respondas al ili; — p. 116 — Franca Touring-Club, kiu havas 80.000 anojn, kampanjas favore al ĝi ; fine, la internaciaj ligoj : ligo de la paco, unuiĝoj de junuloj, ktp, ne malrapide uzos ĝin. Kio estis komence nur amuzaĵoj — same kiel por s-ro [Thiers](#) la lokomotivo [**Rimarko H.M.** : Thiers (*tjer*) estis iama prezidento de Francio kaj konsideris la lokomotivon kiel ludilon] — rapide fariĝos valorega rimedo de komunikado. Tiam oni permesos, timeme, la instruadon de Esperanto en la establejoj de publika instruado, kie ĝi finfine havos oficialan lokon.

Tiun tagon, la internacia helplingvo estos venkinta. La uzado aspektos al ĉiuj tre memkomprenebla afero, kaj tio, kio plej surprizos, tio estos ke homoj, kies spirito ne absolute malinklinas al ĉiu ideo ne multe kutima, homoj kleraj, homoj spritaj, eĉ inteligentaj, povis juĝi la serĉadon de lingvo internacia utopia, se oni aŭdacas tion diri, kaj eĉ sufiĉe ridinda !

L'ESPERANTO

p. 117

Corret citas unue kelkajn ideojn el la libro "**Qu'est-ce que l'Esperanto ?**" (Kio estas Esperanto ?) de la rektoro Émile Boirac.

En ĝi, la rektoro precizigas unue ke, kontraŭe al tio, kion imagas tro da homoj, la partizanoj de Esperanto tute ne celas anstataŭigi la idiomojn de la homaro; tiu ĥimero ekzistas nur en iliaj cerboj. Esperanto tute ne celas tion.

p. 118

Ĝi celas ebligi al ĉiu homo, kiu havas aŭ deziras havi internaciajn rilatojn kaj, eĉ sen profundaj gramatikaj konoj, senpene komuniki skribe kaj parole kun fremduloj, kies lingvojn li ne konas kaj kiuj same ne konas lian lingvon. Scipovantoj de Esperanto plue parolos sian gepatran lingvon kun samlandanoj.

Corret citas propran sperton : *“Fakte tiun servon Esperanto jam havigas al tiuj, kiuj posedas ĝin. Se mi povas citi ĉi tie mian personan sperton, mi korespondas, dank' al ĝi kun multe da homoj, rusoj, ĉeĥoj, bulgaroj, svedoj, islandanoj, kies lingvoj estas de mi tute nekonataj, kaj kiuj ne scipovas pli bone la mian, ne beletristoj aŭ profesiaj scienculoj, sed kelkaj almenaŭ apartenas al la plej humilaj sociaj klasoj“.*

Li poste mencias statistikon de 1904 laŭ kiu estis tiam 80.000 uzantoj de Esperanto. [Rimarko H.M. : Povas esti interese aldoni ĉi tie eltiraĵon, kiu ne aperas en la disertacio, el la verko **“L'homme et la Terre“** (La Homo kaj la Tero] de la fama geografo [Élisée Reclus](#), aperinta ekde 1905 sub formo de kajeroj — p. 467 : *“La nombro de la adeptoj, kiuj eniris la vojon de praktika realigado estas jam sufiĉe notinda por esti iom modifinta la poŝtan statistikon : nur dek jarojn post la naskiĝo de Esperanto, tiuj kiuj uzas ĝin en siaj leterinterŝanĝoj superus 120 000.“*]

p. 119

Esperanto forigas la limojn, realigante en la intelekta kampo la miraklon jam realigita sur la materiala kampo per la telefono kaj la senfadena telegrafo, ĝi metas la spiritojn en tuja komunikado de fora loko al alia.

Skeptikuloj, kiuj apriore asertas ke tia miraklo estas neebla, forgesas ke neebleco ne ekzistas por la genieco. Nu, ju pli oni studas Esperanton, des pli oni konstatas, ke la modesta homo kiu ĝin kreis, estas unu el tiuj geniaj inteligentecoj, kies memoro estas ligita en la historio al ĉiu el la decidaj paŝoj de la homaro survoje al la progreso

Certe, la problemo de artefarita internacia lingvo aperas, unuavide, eksterordinare malfacile, eĉ neeble solvebla, kaj tamen, kiam oni konas la solvon, kiun havigas Esperanto, oni preskaŭ emas kredi ke nenio estas pli simpla kaj facila.

Baza ideo de Zamenhof por krei vere internacian artefaritan lingvon konsistis el uzo de naturaj elementoj jam internaciaj. Kiu ajn disvolvos tiun principon trovos en Esperanto ne pli da fremdeco ol, — p. 120 — ekzemple, inter la portugala kaj la hispana.

Sekvas klarigoj pri la internacieco de la radikoj jam konataj en multaj lingvoj, ekzemple, por la francaj vortoj *mathématique, mécanique, physique, astronomie, géographie, philosophie*, ktp, aŭ *électricité, photographie, locomotive*, ktp, aŭ *Europe, Asie, Afrique, Amérique* ktp, ktp, laŭ la fonetiko propra al Esperanto tiuj radikoj fariĝas *matematik, fizik, astronomi, geografî, filozofi, elektr, fotografi, lokomotiv, Eŭrop, Azi, Afrik, Amerik*, kaj per aldono de la litero "o" formas substantivojn kaj per la aldono de "a" adjektivojn, ktp.

Pli multnombraj ol oni supozas estas tiuj internaciaj radikoj.

p. 121

Tamen, kiom ajn multnombraj estus tiuj internaciaj radikoj, tio ne sufiĉus por fari kompletan vortaron. Ĉar absoluta aŭ kvazaŭ absoluta internacieco estas neebla, necesas kontentiĝi per relativa internacieco laŭeble plej granda.

La internacie plej disvastigitaj lingvofamilioj estis en la periodo, kiam Corret verkis sian disertacion :

1° la novlatinaj (160 milionoj da parolantoj);

2° la angla (125 milionoj);

3° la ĝermanaj (ĉ. 75 milionoj);

4° la slavaj (ĉ. 90 milionoj).

La lingvoj derivitaj de la latina estis parolataj de triono el la tiam "civilizita homaro" (160 el 450) [**Rimarko H.M.** : tiu ĉi esprimo povas ja ŝoki en la nuna mondo, cent jarojn poste !].

p. 122

Pli ol duono el la angla vortrezoro havas latinan devenon. El tio rezultas ke 285 milionoj el 450, t.e. pli ol duono de la "civilizita homaro", por kiuj la latinaj radikoj estas tuj kompreneblaj.

Eĉ nur iom kleraj germanoj kaj slavoj havas konojn tiurilate pro tio ke ĉiu moderna civilizacio fontas el la greka-romana civilizacio.

Se la latina, konsiderata en sia tuteco, vortaro kaj gramatiko, ĉesis esti la universala lingvo, ĝia vortrezoro restas tamen la komuna fonto la plej internacia en kiu ĉiuj popoloj venas devige ĉerpi.

Pro tio la latinaj radikoj, kiuj estas komunaj al la lingvoj novlatinaj kaj angla, estos devige en plimulto, poste aldoniĝas la ĝermanaj, kiuj estas komunaj al la angla kaj al la ĝermanaj lingvoj, kaj fine la slavaj en malgranda nombro.

p. 123

Pro tio la lingvo estas apenaŭ artefarita, ĉar en realeco ĝi konsistas el radikoj de naturaj lingvoj, tiel ke ĉiu meze klera homo konas Esperanton unuavide por frakcio pli malpli konsiderinda.

Ĉiuj parolantoj de romanaj lingvoj, t.e. devenantaj el la latina, francoj, hispanoj, portugaloj, italoj, rumanoj povas ofte deĉifri je unua vido tutajn Esperanto-frazojn. Ideon pri tio donas la jena frazo, kiu entenas nur vortojn tuj kompreneblajn por franco :

“Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de lingvo internacia. Tre facila por homoj nemulte instruitaj, Esperanto estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj.”

Franca traduko :

“Simple, flexible, harmonieux, vraiment international en ses éléments, l'Esperanto présente au monde civilisé la seule véritable solution d'une langue internationale. Très facile pour des hommes peu instruits, l'Esperanto est compris sans peine par les personnes qui ont reçu une bonne éducation.”

La proporcio de radikoj tuj kompreneblaj estas iom malpli granda por la angloj, ankoraŭ malpli granda por germanoj kaj ĉefe por slavoj, — p. 124 — se ili estas tute fremdaj al ĉiu klasika kulturo. Tamen ili estas sufiĉe konsiderindaj por ke, en lernado de Esperanto, ili retrovu multajn konataĵojn.

En tio estas unu el la kialoj pro kiu Esperanto estas lernebla kun eksterordinara facileco. El 2 600 radikoj, kiujn enhavas la **Universala Vortaro** (de Zamenhof), franco jam konas 1 500; se li scipovas la latinan, li konas pli ol 2000, kaj fine se li havas ioman konon de la vortrezoroj germana kaj angla, li konas preskaŭ ĉiujn.

Tial la objetoj faritaj ekzemple pri volapuko aŭ la blua lingvo (de Léon Bollack) ne estas eblaj kontraŭ Esperanto.

Al tiuj, kiuj diras ke Esperanto, kies estonteco estas necerta, ke ĝi estos eble neutila, ke ĝi estos nur plia lingvo, plia ŝtono aldonita al la Babelturo, la respondo estas ke Esperanto ne aldoniĝas al la jam ekzistantaj lingvoj sed eltiras el tiuj ĉi tion, kion ili havas komune por fari vere internacian idiomon.

Eĉ en la hipotezo de ne disvastiĝo — kvankam la faktoj pruvas la malon — tiuj, kiuj studas ĝin ne perdas sian tempon — p. 125 — ĉar ĉiukaze restos al ili la kono de radikoj pruntitaj de Esperanto al lingvoj aliaj ol gepatraj.

Oni ne konkludu el tio ke, por lerni Esperanton, necesas unue lerni ĉiujn tiujn lingvojn. Oni rekte lernas Esperanton, sed ĝin lernante, oni iel samokaze lernas pli malpli konsiderindan parton el tiuj lingvoj.

Corret : *“Tiel mi ŝuldas al la Esperantostudado, certan inicadon al la germana, kiu ebligas al mi pli malpli elturniĝi en iom facilaj germanlingvaj tekstoj sen konsulti gramatikon kaj vortaron. Mi eĉ volonte kredus, kiom ajn paradoksa povas aspekti tiu opinio, ke Esperanto povos iam fariĝi unu el la plej potencaj iloj pri kiuj disponos niaj instruistoj por la instruado de ĉiuj vivantaj lingvoj.”* [substrekitaj de mi — H.M.]

Oni eble imagos ke la Esperanto-vorttrezoro, tiel reduktita je dumil kaj kelkaj radikoj, el kiu nur milo estas necesa por kutima uzado, estos neeviteble ekstreme malriĉa kaj, ke, sekve, la lingvo Esperanto estas mem speco de lingvaĉo, sabiro nekapabla esprimi plej etajn nuancojn de la penso.

Kaj tamen Esperanto estas, en realeco, senfine riĉa, pli riĉa, ne nur ol la franca, sed eĉ ol la angla, la germana kaj la malnova greka; — p. 126 — ĝi taŭgas por facila esprimado de ĉiuj ideoj, eĉ la plej delikataj kaj la plej subtilaj.

Estas tiel ke Zamenhof povis traduki en Esperanton **“Hamleton”** de Ŝekspiro, sekvante tiel fidele la tekston ke la blankaj versoj estas redonitaj en blankaj versoj, la rimversoj en rimversoj, la prozo en prozo, kio estus nefarebla en la franca. Ne nur Hamleto, sed la ses unuaj kantoj de **“Iliado”**, **“Kaino”**, de lordo Bajrono; **“Boris Godunov”**, de Puŝkino, kaj multaj aliaj verkoj estis tradukitaj Esperanten.

La aŭtoro mem de tiuj linioj povis konstati tiun mirigan flekseblecon de Esperanto tradukante en tiun lingvon la **“Monadologion”**, de Lejbnico, t.e. unu el la plej abstaktaj filozofiaj verkoj, kiuj ekzistas en la mondo.

Oni diros : kiel lingvo povas esti samtempe tiel riĉa je vortoj kaj malriĉa je radikoj ?

La klarigo de la enigmo estas tre simpla : ĝi kuŝas entute en la sistema uzado de obligiloj [obligaj elementoj] elektitaj de Zamenhof kun vere genia sagaceco.

Tiuj obligiloj estas unue la finaĵoj, kaj poste la afiksoj.

Al iu ajn radiko sufiĉas aldoni la finaĵojn *o, a, e, i*, por obteni laŭvice la substantivon, la adjektivon, la adverbon kaj, se la senco de la radiko ebligas tion, la verbon (infinitive).

Ekzemple, la radiko *parol*, kiu esprimas la ĝeneralan ideon paroli fariĝas sinsekve — p. 127 — substantivo *parolo*; adjektivo *parola*; adverbo *parole*, verbo je infinitivo *paroli* (respektive en la franca : *parole, oral, oralement, parler*).

La radiko *vol* donas *volo, vola, vole, voli* (respektive en la franca : *volonté, volontaire, volontairement, vouloir*) ktp, ktp.

Sekvas el tio ke la 2000 radikoj de l'Esperanto estas iel obligita, apriorie, per 4, kaj tuj havigas 8000 substantivojn, adjektivojn, adverbojn kaj verbojn, sen trudi al nia memoro alian strebon ol tiu memori la kvar finaĵojn *a, e, i, o*, kun la signifo atribuita al ĉiu el ili.

El tio rezultas alia konsekvenco, ke ni neniam estas haltigitaj en Esperanto, kiel okazas tiel

ofte en la aliaj lingvoj pro foresto de unu el la terminoj de la gramatika serio : substantivo, adjektivo, adverbo aŭ verbo, kiujn oni emis kredi elirintaj el sama radiko. Ekzemple, oni havas la substantivon *parole* kaj verbon *parler*; sed ĝi necesigas uzon de alia radiko por la adjektivo *oral* kaj la adverbo *oralement*.

Sed, laŭ alia vidpunkto, kio estas mirinda en tiuj finaĵoj, tio estas la klareco kiujn ili alportas en la gramatika analizo de la frazo. Dank' al ili, fakte, ĉiu vorto iel prezentas sin kvazaŭ ĝi dirus : “*Substantivo mi estas, adjektivo mi estas, adverbo mi estas.*“ Neniu alia lingvo prezentas tian karakterizon, kaj pro tio neniu estas tiel uzebla kiel Esperanto por tuja tradukado — p. 128 — per la nura rimedo de vortaro, sen postulo pri antaŭa kono de la gramatiko.

La finaĵoj havigas vortojn tuj derivitajn de la radiko, la afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj) ebligas krei nenombreblajn duarangajn vortojn, kiuj modifas diversmaniere la ĝeneralan ideon kiun la radiko esprimas.

La afiksoj de Esperanto estas kvazaŭ speco de klavaro, konsistanta el ĉirkaŭ 30 klavoj, per kiu eblas diversigi senfine la sencon de la radikoj, kaj sekve esprimi kaj tiel moduli la plej fajnajn kaj neperceblajn nuancojn de la penso.

Jen kelkaj ekzemploj.

En ĉiuj lingvoj ekzistas terminoj, kiuj estas kontraŭaj unuj al la aliaj : la mal-vortoj [antonimoj]. Sed, ekzemple en la franca, ili tute malsimilas, tiel ke ambaŭ estas lernendaj : *grand - petit, fort - faible, amour - haine, estime - mépris, fermer - ouvrir*, ktp, t.e. respektive : *granda - malgranda, forta - malforta, amo - malamo, estimo - malestimo, fermi - malfermi*, ktp.

Tamen, en la franca, tiu principo funkcias same, sed nur por malmultaj vortoj kaj ne tiel sisteme : ekzemple : *heureux - malheureux, honnête - malhonnête, priser - mépriser, content - mécontent, couvrir - découvrir, obéissant - désobéissant*, ktp, t.e. respektive : *feliĉa - malfeliĉa, honesta - malhonesto, estimi - malestimi, kontenta - malkontenta, kovri - malkovri, obeema - malobeema*.

En Esperanto, nur unu prefikso, “*mal*“, sufiĉas por tuj formi ĉiujn antonimojn sen ebla escepto.

p. 129

Per uzo de la prefikso “*mal*“, la memoro estas konsiderinde senŝarĝigita, ĉar, por la tuta serio de kontraŭoj [malvortoj, antonimoj], sufiĉas lerni unu terminon por koni du.

Corret montras sinsekve la uzon de afiksoj kaj tiel evidentigas la regulecon de Esperanto kompare al la franca, ekz. “*eg*“ kaj “*et*“:

Arbo, arbre
Arbeto, arbuste
Arbego, arbre de haute futaie

Pluvo, pluie
Pluveto, bruine
Pluvego, averse

“*ek*“, “*ad*“, “*ig*“

“*ek*“
flugi, voler ;
ekflugi, s’envoler
krii, crier
ekkrii, s’écrier.

“*ad*“
pafi, tirer un coup de fusil
pafadi, faire une fusillade
paroli, parler
paroladi, discourir

Ebleco krei substantivon per anstataŭigo de “i” per “o”:

ekflugo, essor

pafado, fusillade

fari, faire

farigi, faire faire

vidi, voir ;

vidigi, faire voir, montrer

p. 130

bela, beau

beligi, rendre beau, embellir

pala, pâle

paligi, rendre pâle, faire pâlir

“em”, “ebt”, “ind”

“em”

kredema, enclin à croire, crédule

kredetala, possible à croire, croyable

kredinda, digne d’être cru, digne de foi

legema, qui aime à lire

legebla, lisible ; *leginda*, qui mérite d’être lu.

“i”

kudrilo, aiguille

flugilo, aile

kombilo, peigne (kombi, peigner)

plugilo, charrue (plugi, labourer)

“ar”

arbaro, forêt

vagonaro, train (de chemin de fer)

bovaro, troupeau de boeufs

“ej”:

lernejo, école (lerni, apprendre)

kuirejo, cuisine (kuiiri, faire cuire)

porkejo, porcherie

hundejo, chenil (hundo, chien)

“ec”:

boneco, bonté

grandeco, grandeur

patreco, paternité

“ul”, “ist”, “estr”

“ul”

junulo, jeune homme (juna — p. 131 — jeune)

blindulo, un aveugle (blinda, aveugle)

timulo, un poltron (timo, peur)

instruisto, instituteur

kuiristo, cuisinier

kuracisto - médecin (kuraci, traiter un malade)

lernejestro, maître d’école

regnestro, chef d’Etat

imperiestro, empereur

elefantestro - cornac

Pri la kombinebleco de pluraj afiksoj inter si kaj kun radikoj:

arb-et-aro, bocage [**rimarko H.M.** : pli ĝusta, por la vorto "*bocage*" (*bokaj*), estas "*heĝa kamparo*"]

reg-ist-aro, gouvernement (ensemble de gouvernants)

grand-eg-ulo, géant

Same kiel la greka kaj la germana, Esperanto ebligas kreon de novaj vortoj per kunmeto de du radikoj:

Fervojo, chemin de fer (*fero, fer*; vojo, chemin)

Lumturo, phare (*lumo, lumière*; turo, tour)

Sunfloro, tournesol (*suno, soleil*; floro, fleur)

Ne malpli rimarkinda ol ĝia vorttrezoro estas la simpleco de la gramatiko de Esperanto, tiel simpla kaj konciza ke oni povis diri, ke ĝi konsistas entute [**Rimarko HM** : troiga vorto, same kiel estus "nur"] el 16 reguloj.

Ĝi estas ankaŭ vere internacia en tiu senso ke ĝin konsistigas reguloj komunaj — p. 132 — al ĉiuj grandaj modernaj lingvoj escepte de apartaj reguloj de ĉiu el ili

Sekvas rapida trarigardo pri kelkaj bazaj reguloj:

1° ekzistas nur unu artikolo, nur difinita : "*la*" ;

2° substantivo ne havas genron; ineco estas indikebla per la sufikso "*in*" ;

3° la pluralo estas indikebla per la duonvokalo "*j*" ;

4° sekvas la personaj pronomoj, regulo pri objekta rekta komplemento, klarigo pri la konjugacio de la verbo "*esti*" — p. 133 — kaj de ĉiuj aliaj verboj, kies konjugacio estas tute sama.

Corret konkludas jene tiun ĉapitron:

"Ni volis, en tiu disertacio, prefere ol teorie disertacii pri la utileco de alpreno de internacia lingvo en medicino, alporti dokumentojn, kiuj pruvas ĝis kioma grado la internaciaj medicinaj rilatoj estas ĝenataj pro la lingvodiverseco

Oni ĝenerale akordiĝas pri tiu punkto, sed solvo ne estis ĝis nun trovita por meti finon al tiu bedaŭrinda situacio.

Ni montris ke de ĉiuj flankoj oni komencas serĉi tiun solvon en la alpreno de Esperanto, kaj ni pruvis aliflanke ke tiu lingvo ebligas facile pritrakti medicinajn temojn — p. 134 —. La raporto, kiun oni ĵus legis pri ĝia konsisto, kunmetita kun la pruvoj kiujn ni aldonis, finos, mi esperas, konvinki pri la ebleco de ĝia alpreno kiel internacia helplingvo en medicino."

KONKLUDOJ

p. 135

1. - La lingvodiverseco alportas al la internaciaj medicinaj kongresoj ĉiam kreskantajn malfacilaĵojn, ĉiam sentataj kaj esprimitaj ĉefe fare de la medicinistoj, kies nacia idioma estas ordinare neakceptata en tiuj kongresoj.

Multaj kongresoj esprimis deziron por ke, por meti finon al tiuj malfacilaĵoj, oni alprenu en la internaciaj kongresoj la internacian helplingvon Esperanto. Certa nombro el ili jam alprenis mem tiun lingvon, precipe en la lasta Internacia Medicina Kongreso de Lisbono kaj en la Unua Internacia Kongreso de Fizioterapio, kie komunikaĵoj en Esperanto estis prezentitaj fare de D-ro Krikortz, el Stokholmo.

Ĉar Esperanto estas por ĉiuj tre facile akirebla, kaj ĉar ĝi ebligas facile pritrakti medicinajn temojn; ĉar la sperto pri internaciaj esperantistaj kongresoj demonstris aliflanke, ke ĝi ebligas la tujan pridiskutadon de plej diversaj demandoj inter diverslingvaj kongresanoj, nekapablaj interkompreniĝi en iu ajn el la naciaj idiomoj, estas dezirinde ke ĝia uzado fariĝu pli kaj pli ĝenerala en la internaciaj medicinaj kongresoj, kaj, tiucele, ke ĝi estu de nun ĉiam akceptata en la nombro de la oficialaj lingvoj de tiuj kongresoj.

p. 136

2. — Estas ankaŭ dezirinde, pro la samaj kialoj, ke la aŭtoroj de medicinaj artikoloj kaj verkoj prezentantaj ĝeneralan intereson, sekvigis sian laboron per resumo en Esperanto, kiel faris precipe D-ro Lambert, en sia disertacio de Zuriko pri la teorio de distordo de humero, kaj kiel tion faras de nun la rusa revuo "**Hirurgija**". La kuracistoj de ĉiuj nacioj povos tiam facile informiĝi pri la fremda medicina literaturo.

3. — La kono de la internacia helplingvo Esperanto, ĝenerale disvastigita inter la medicinistoj, multe plifaciligas la internaciajn medicinajn rilatojn, ĉu inter medicinistoj ne parolantaj la saman lingvon, ĉu inter malsanuloj kaj kuracistoj de malsamaj naciecoj.

4. — Tiu kono estus same valorega dum milita tempo, en la servoj de la Ruĝa Kruco, inter la kuracistoj diversnaciaj vokitaj por kuraci vunditojn de militantaj armeoj, same kiel inter ĉi lastaj kaj la kuracistoj, kiuj povus facile kompreniĝi sin de ili per malgrandaj specialaj gvidiloj, kies publikigado jam komenciĝis.

5. — Ĉar la alpreno, kiel internacia idioma, de unu el la lingvoj nuntempe vivantaj estas nebla pro la interpopolaj rivalecoj, kiuj ĉiam kontraŭstaros al tio, ke la diversaj nacioj — p. 137 — interkonsentu pri la elekto de la lingvo de unu el ili ;

— ĉar la alpreno de la latina ne estas pli akceptebla pro tio ke, malnova lingvo, ĝi pli kaj pli maltaŭgas por disvolvo de moderna teknika lingvo, kaj ke necesus antaŭe, por ĝin uzi, ĝin simpligi kaj kompletigi, kio farus el ĝi nur malbonan artefaritan lingvon;

— la elekto de neŭtrala lingvo, artefarite kombinita kaj facile lernebla, fariĝas necesa por la rolo de internacia helplingvo, kaj inter ĉiuj projektoj pli malpli kompletaj prezentitaj ĝis nun ekde [Lejbnico](#) kaj [Kartezio](#), Esperanto estas la sola kiu, posedanta ĉiujn necesajn ecojn, povis reale eniri la vojon de praktikaj aplikoj kaj posedas en la tuta mondo jam konsiderindan nombron de adeptoj.

Vidita de la Prezidanto de la Disertacio,
BOUCHARD

Vidita de la Dojeno,
L. LANDOUZY

Vidita, kun prespermeso, de la Vic-Rektoro de la Eduk-Distrikto de Parizo
L. LIARD

BIBLIOGRAFIO

p. 139

I. - Disertacioj.

LAMBERT (F.). — Beitrag zur Theorie der Torsion des Humerus nebst einer kurzen Uebersicht in Esperanto (Internationale Hilfssprache). — Zürich 1904.

FAUVART-BASTOUL (L.). — D'une langue internationale au point de vue du Droit des Gens. - Dijon 1902.

II. – Verkoj en la franca pri Esperanto.

ASSOCIATION FRANÇAISE POUR L'AVANCEMENT DES SCIENCES (Congrès de Grenoble 1904). — La langue internationale auxiliaire (Extrait du Bulletin mensuel, numéro 10, Décembre 1904).

AYMONIER. — L'Esperanto, solution logique et pratique du problème de la langue internationale.

BAYOL (Lieutenant G.) — Esperanto et Croix-Rouge.

BAYOL (Lieutenant G.) — Guide Esperanto de la Croix-Rouge.

BEAUFONT (L. de). — L'Esperanto, seule vraie solution de la langue internationale auxiliaire.

BEAUFONT (L. de). — L'Esperanto, ses raisons d'être, sa structure, ses services, sa diffusion.

BEAUFONT (L. de). — Un bien beau leurre : La compréhensibilité immédiate dans la langue internationale.

BEAUFONT (L. de). — La langue internationale peut-elle être le latin ?

p. 140

BOIRAC (E.). — Le congrès espérantiste de Genève.

BOIRAC (E.). — Qu'est-ce que l'Esperanto ?

BOURLET (C.). — L'Esperanto, conférence aux officiers de l'Ecole supérieure de marine.

CART (Th.). — À la recherche d'une langue internationale.

CART (Th.) — Une heure d'Esperanto (Conférence dialoguée).

CART (Th.). — Rapport sur l'Esperanto adressé à M. le Ministre de l'Instruction publique.

CHAPEAU (J.). — L'Esperanto, ses règles, sa logique.

CHAVET (G.). — L'Esperanto, Où en sommes-nous ?

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO. — La presse et les congrès universels d'Esperanto.

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO. — L'Esperanto et les institutions publiques.

EVROT — Conférence sur l'Esperanto. langue internationale auxiliaire.

LAFARGUE (G.). — Nécessité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire.

LEMAIRE (Ch.). — L'Esperanto, solution triomphante du problème de la langue universelle.

MÉNIL (F. de). — Les préjugés contre l'Esperanto.

- MEYER (S.)**. — Une langue internationale. Pourquoi ? Comment ?
- MIEILLE (P.)**. — Le problème de la langue internationale et sa solution par l'Esperanto.
- MIEILLE (P.)**. — L' Esperanto, sa situation actuelle, son avenir.
- MOCH (G.)** — La question de la langue internationale et sa solution par l'Esperanto.
- OFFRET**. — La diffusion de l'Esperanto dans le monde.
- PELTIER**. — Esperanto. Qu'est-ce ?
- PRIOU (Général)**. — Intercompréhension dans les formations et établissements sanitaires en temps de guerre.
- SACRE**. — L' Esperanto, langue internationale auxiliaire.
- SAQUET**. - Une langue internationale, l'Esperanto.
- SENTIS (H.)**. - Le triomphe de l'Esperanto est-il certain?
- THIAUCOURT**. - Dernière conférence sur la langue internationale Esperanto.
- p.141**
- TOURING-CLUB DE FRANCE**. — Esperanto, langue auxiliaire internationale.
- UNUEL**. — Essence et avenir de l'idée d'une langue internationale.
- VALLIENNE (Dr)**. — Pour et contre l'Esperanto.

III. — Journaux médicaux ou scientifiques en Esperanto.

Internacia Revuo Medicina.

Voĉo de Kuracistoj.

Internacia Scienca Revuo.

IV. - Ouvrages médicaux ou scientifiques en Esperanto.

- ALBERT (D-ro A. Y.)**. — Kuracado de la mallakso kaj de ĝiaj komplikoj.
- BAUER (L.)**. — Nova, estonte reganta terapio de diabeto.
- BILZ**. — Oraĵ reguloj por la vivado.
- DARDEL (D-ro J.)**. — La tekniko de la termala kuracado ĉe Aix-les-Bains.
- FOURNIER (Prof. A.)** — Por niaj filoj kiam ili estos dek-ok jaraj.
- GOOD (D-ro P.)**. — Higieno kaj moralo.
- GROUPE MÉDICAL ESPÉRANTISTE DE FRANCE**. — Anatomia Vortaro.
- JAVAL (D-ro E.)**. — Inter Blinduloj. Konsiloj por uzado de ĵus blindiĝintoj.
- LEGRAIN (D-ro)**. — La sendependa ordeno de la bontemplanoj (sociala solvo de l'alkoholisma problemo).
- N.** — La aerkuracloko Weisser Hirsch apud Dresden.
- THIROUX (D-ro H.)** — Raporto hidrologia kaj medicina pri la termala ŝlimbanejo de Saint-Amand-les-Eaux.
- BERTHELOT**. — Provo de kemia nomigado.
- BRICARD (R.)**. — Matematika terminaro.
- DOMBROWSKI (A.)**. — Pri unu speco de kurbaj linioj.

DOMBROWSKI (A.). — Pri novaj trigonometriaj sistemoj.

GRUEY (L.-J.). — La sunhorloĝo en Dijon.

HELTE (D-ro). — La teorio de l'jonoj.

HUNTINGTON (E.-V.) — La kontinuo.

LÉGER. — Sondilo skrapanta.

LENGYEL (P.). — La kalendaro.

MENDELEJEV. — Provo de kemia kompreno de l'monda etero.

N. - Tabelo de vortoj teknikaj.

POLJANSKIJ. — Kurioza sunhorloĝo.

RICHET (Ch.). — Spontanea generado.